

SECRETARIO DE LA LIGAJ PROLETAJ  
ESPERANTAJ LINGVO-KOMISIONOJ (ISLK)

---

# AL LA NOVA ETAPO

EKRELO

1932

LEIPZIG

ADRESOJ DE PROLETAJ LINGVO-KOMISIONOJ:

Internacia sekretariaro: Moskvo, Spiridonovka, 15  
Sekretario *N. Hohlov*

Lingva komisiono de Soveta esperantista  
unio: Moskvo, Spiridonovka, 15

Lingva komisiono de germana laborista es-  
peranta asocio (GLEA): Germanio, Berlin. C 25,  
Dircksenstr. 42

Lingva komisiono de Japana proleta espe-  
ranta unio (JPEU): Japanio, Tokio, Kanda, Ĉijo-  
da-ĉo 10

Lingva komisiono de Bulgara laborista  
esperanta asocio (BLEA): Bulgario, Sofia, Shar  
Planina 56

□ □ □

16 x 2009 helfo 005694 JC

82  
INTERNACIA SEKRETARIARO DE LA LANDAJ PROLE-  
TAJ ESPERANTAJ LINGVO-KOMISIONOJ (ISLK)

---

# AL LA NOVA ETAPO

-EKRELO

1932

LEIPZIG

R-5641

Lingve kontrolis E. Drezen.



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDESA 1906

## AL LA NOVA ETAPO

Rezolucio, akceptita en la kunsido de la lingva komisiono de SEU la 28-an de junio 1931 kaj aprobita de la alilandaj proletaj esperantaj lingvo-komisionoj

La senprecedenta historia etapo, kiun eniris Sovetlando en la 3-a decida jaro de sia kvinjarplano, kun sukceso fin-konstruante fundamentan bazon de socialismo, la racia kaj laŭplana organizado de ekonomio, de produktantaj, sciencaj kaj teknikaj laboroj, akompanata per intensega entuziasmo de laborulaj amasoj, tutkolektive kaj interkonkure partoprenantaj la socialisman konstruadon kaj en sia plenumado superantaj ĉiujn teoriajn planojn kaj kalkulojn de unu flanko — kaj la ĉiutage kreskanta en kapitalistaj landoj degenero de ekonomio kaj produktado, kolosaj nombroj da senlaboruloj, foresto de veraj kreaĵ impulsoj kaj stimuloj, servema adaptiĝo de la scienca kaj teknika pensoj al merkantilaj kaj parazitantaj fortoj, celantaj en sia marasmo detruigi la socialisman konstruadon de la sovetlandaj proletoj per preparo de novaj militoj kaj intervencoj kontraŭ ilia socialisma patrio; la ĉiam pli vasta kresko de klaskonseca revoluciemado de proletoj en la landoj de kapitalisma ekspluatado aliaflanke — estante ofte du intereseceptantaj maloj, dividintaj la nunan klas-strukturan homaron je du malamikaj tendaroj — imperative diktas ankaŭ novan etapon en la agado de la Lingva Komisiono de SEU.

Akceptante kiel unuan nepran kondiĉon de sia plua ekzisto aktivecon plene konforman al la progresado de la socialisma konstruado en la lando kaj racie planatan por la servo al tiu ĉi konstruado, la Lingva Komisiono de

SEU, estante por la teritorio de USSR centra teori-praktika lingvo-esplora kaj lingvo-organiza faktoro de esperanto, antaŭ akcepto de ĉiuj aliaj deklaroj, proklamas sin kontraŭa al ĉiuj fetišaj kaj pure ideatismaj adoradoj de la lingvo esperanto mem, kaj traktas tiun lingvon laŭ la sole por si konvena marksism-leninisma trakto de la dialektika materialismo.

Konsekvence al tiu trakto de esperanto la Lingva Komisiono de SEU plue deklaras, ke ĝi konsideras tiun lingvon la sola pruvita per longa socia praktikado, racia kaj efika el ĉiuj aliaj ĝisnunaj artefaritaj internaciaj lingvoj.

La principoj de la kolektiva kreado de lingvo, sur minimuma deviga fundamento, kiujn aplikis al esperanto ties aŭtoro kaj kiuj garantiis al la lingvo ĝian venkan pozicion, estas laŭ la opinio de Lingva Komisiono de SEU la sole ebla vojo por la estonta evoluo de la lingvo. Ĉiu arbitra kontraŭkolektiva kaj tial mekanika trakto de la evolu-principoj de esperanto devos renkonti flanke de la Lingva Komisiono de SEU energian depuŝon kaj kontraŭagon.

Depende de la dirita la Lingva Komisiono estas kontraŭa al ĉiuj nekonsekvencaj, precipe grandskalaj kaj mase koncentritaj eksperimentoj kun esperanto, kiuj sen la necesa laŭtempa aproba verdikto de la amasoj povus konduki al tre danĝera splitiĝo kaj disdialektiĝo de la lingvo.

La Lingva Komisiono de SEU tamen plej decide malaprobas ĉiujn reakciajn baradojn de la lingvo-evoluo, kiuj—kiel jam komencas pruvi la historio de la esperanto-evoluo—postrestigas kaj malfortigas la efikon de la lingvo.

La Lingva Komisiono de SEU kun granda kontento akcentas firmiĝon de tiu grava socia rolo de esperanto, kiun alportis al ĝi la amasa kolektiva kaj individua proleta korespondado, precipe en la periodo de la socialisma konstruado en USSR. La nove aperanta socia rolo de esperanto,

devanta fariĝi ne malpli grava perilo por la amasa akiro de eksterlanda teknika teoria kaj praktika sperto kaj la revoluci-eduka kulturanta efiko de la esperanto-korespondado por la vekigantaj koloniaj kaj duonkoloniaj popoloj, prezentas — laŭ la firma opinio de la Lingva Komisiono de SEU — unu el la plej ĉefaj faktoroj, kiuj alportos al esperanto ĝian finan, universalan agnoskon.

Sed ĝuste tiu kreskanta socia signifo de la lingvo en la sferoj de la proleta informa kaj teknika korespondado devigas la Lingvan Komisionon publike konstati tre bedaŭrindan postrestadon de la lingvo en la priservo de tiuj gravegaj sferoj. Tiu postrestado fariĝas sur kelkaj sektoroj tre danĝera kaj signalas paralizon por ĉiu plua laboro. Cetere tiu postrestado estas ne unufoje jam notita ankaŭ de la neŭtralisistoj, burĝaj esperantaj lingvo-fakuloj.

Forigi tiujn mankojn kaj breĉojn estus rekta devo de la centraj lingvo-institucioj de esperanto, sed la Lingva Komisiono posedas multajn pruvojn, ke la malaperigo de menciitaj mankoj kaj breĉoj okazas tute ne adekvate al la postuloj de nia tempo, ĉar estas sperto ne sole de la Lingva Komisiono de SEU, ke la komplika, malvigla plenumaparato de la centraj esperantaj lingvo-institucioj, dank'al sia strukturo, bezonanta internajn kaj eksterajn reformojn, — ne kapablas iri sampaŝe kun la tempo, precipe en konsidero kun la progresoj kaj evoluo de la proleta klaso.

Tamen, se ekzistus por la klaskonsciaj proletoj iuj speroj vidi la evoluon de la lingvo adekvata al la tempo el la vidpunktoj de gramatiko, vortaro aŭ aliaj formalaj flankoj — sub la gvido de la solaj centraj esperantaj lingvo-institucioj — neniu espero restas por ili vidi sub la nomita gvido la necesan korekton de la ideologia enhavo de la lingvo kaj ties uzado. La Lingva Komisiono de SEU ne hezitas diri, ke tiu ideologia enhavo kaj uzmaniero de la lingvo esperanto estas ofte tute kontraŭa al la pensmaniero kaj lingvo-uzo de la veraj proletoj, pro tiu multjara influo, kiun lasis al esperanto la etburĝa unuaepoka pio-

nira gvidantaro kaj adeptaro. Kiel plej bona ilustrado de tiu aserto povas servi la antaŭnelonge aperinta plena esperantc-esperanta komenta vortaro de SAT. Laŭmende kompilita de la plej spertaj kaj konataj burĝaj leksikografoj, ĝi — malgraŭ la titol-senco, kiun donis la eldoninto — abundas per komentoj de vortoj, kiuj estas malaj, fremdaj kaj eĉ ofendaj por la proletoj. El la vidpunktoj de marksism-leninismo multaj tiuj komentoj povas esti nomitaj rekte kontraŭrevoluciaj. La siatempa propono oficiala de la Lingva Komisiono de SEU trarigardi la komposto-provaĵojn de la vortaro estis de la Direkcio de SAT malakceptita kaj la vortaro, kiun la proletoj rajtis esperi siaideologia — montriĝis al ili tute mala.

Plufoje ripetante ke la ideologia flanko de la internacia lingvo, precipe de ĝia vortaro, estas por la tutmondaj klas-konsciaj kaj revoluciaj proletoj unu el la plej gravaj premisoj por la vera klareco, senĝena funkcio kaj efiko de la lingvo, ke la foresto de necesaj modernaj teknikaj kaj fakaj vortaroj — kies plene efektivebla publikigo estis ĝis nun ial detenata — ke la rekonstruo de la prolet-ideologia enhavo de la lingvo povus en nunaj cirkonstancoj esti efektivebla nur de la proletoj mem, sur la bazo de marksism-leninismaj principoj de la dialektika materialismo, ke la fakaj vortaroj, koncernantaj la teknican produktadon, devas esti kompilitaj kun nepra kritika partopreno de la laboruloj mem, intime ligitaj kun la respektiva produktad-fako kaj ke la profesia lingvo de tiuj laboruloj devas esti pleje atentata; ke la centraj esperantaj lingvo-institucioj dume eĉ ne posedas konkretan aparaton por plenumi ĉi problemojn, la Lingva Komisiono de SEU opinias aktuala kaj necesa organizi inter diversaj naciaj kungrupiĝoj de la proletaj esperantistoj specialajn Lingvo-Komisionojn, kiuj servu al la proletoj, kiel superaj konsultejtoj por ilia faka kaj klasa bezonoj, por starigo de la necesaj ideologi-konformaj komentitaj vortaroj kaj lernolibroj,<sup>2</sup> fine por kamarada kontrol-recenza konsultado



kaj helpo al la komencantaj proletaj esperanto-verkistoj kaj tradukistoj, kaj al multenombraj proletaj korespondantoj.

En la lokoj, kie tiuj komisionoj pro politikaj aŭ aliaj kaŭzoj dume ne estas fondeblaj, oni proponu al la koncernaj naciaj proletaj esperanto-kungrupiĝoj elekton de specialaj lingvo-konsultantoj.

Post la organizo de la landaj lingvo-komisionoj kaj starigo de necesaj lingvo-konsultantoj oni entreprenu starigon de centra organo, unuiganta kaj koordinanta la agadon de ĉiuj naciaj lingvo-komisionoj kaj lingvo-konsultantoj.

La Lingva Komisiono de SEU deklaras ke al organizo de ĉi komisionoj kaj ilia centro instigas ĝin neniuj arbitraj separatismaj celoj. Same ĝi intencas fari neniun renversan atencion kontraŭ la lingvo mem, kion garantiu ĝia firma intenco pleje stimuli la uzon kaj facilan kompreneblon de esperanto inter la vekigantaj subpremitaj koloniaj kaj duonkoloniaj ekstereŭropaj popoloj, kaj en tiu uzado oni bezonos la lingvon precipe klara, pura de ĉiuj pezaj aŭ nenecesaj neologismoj kaj formoj, de baze tre malamplaksa kaj plastika.

Sed kune kun tio la Lingva Komisiono firme opinias esperanton nur transira, evoluonta ŝtupo al la estonta monda helpa lingvo kaj ties pli posta evoluo al la sola, komuna lingvo de la senklasa, sennacia kaj senŝtata socio.

Transirante al siaj aktualaj praktikaj taskoj, la Lingva Komisiono de SEU antaŭ ĉio deklaras sin plene konforma al tiu decido, kiun sekvas ĉiuj aliaj scienc-esploraj kaj teknikaj institucioj de USSR — esti kiel ero de la aktiva kreanta proleta penso ĉiam preta fordoni ĉiujn siajn fortojn kaj seiojn al la socialisma konstruado kaj uzi tiujn seiojn kaj fortojn ĉiam konforme al la bezonoj de la proleta revolucia klaso. Tio devigas la Lingvo-Komisionon de SEU racie plani kaj aranĝi siajn esplorojn kaj laborojn, eviti ĉiun malutilan flankiĝon kaj perdon de la tempo. Apartaj membroj de la Komisiono ĉiam memoru la centran kaj

tre respondigan rolon de komisionano kaj tial en siaj laboroj sekvu ĉiujn ĉefajn principojn de laboro, akceptitaj de la Komisiona kolektivo.

La ĝenerala tasko de la Lingva Komisiono de SEU estas ĉiuflanka armigo kaj organizo de la lingvo esperanto, por ke en ĝia lernado, apliko kaj uzado la proletaj esperantanoj trovu la plej taŭgajn kaj raciajn vojojn al sia lingvo-perfekteco. Tiu armigo kaj organizo estas eblaj nur ĉe la integra funkcio de la teoria kaj praktika laboroj de la Lingva Komisiono, sen kiu ĝia laboro povus akcepti formojn erarajn kaj deklinajn.

Akelante la unuaviciajn bezonojn de la internacia esperanta proleta korespondado la Lingva Komisiono provizu la korespondantojn per bonaj kaj kompletaj modernaj vortaroj, kun ties periodaj suplementoj kaj kompletigitaj reeldonoj. Apartan atenton oni turnu al la viva ekspono de la vortofunkcio, pro kio devas en la vortaroj esti bone montrita la frazeologio de la koncerna lingvo.

Akelante la bezonojn de la korespondado por la teknika proleta interkonsultado, la Lingva Komisiono aranĝu kompiladon de la plej necesaj teknik-fakaj vortaroj, kun nepre partopreno de la profesiaj laboruloj el la produktado. Se necesas — kontakto estu starigota inter la Lingva Komisiono de SEU kaj la Sekcio por la scienca kaj teknika vortaro de la esperanta Akademio. En pli posta tempo rekomendinda estas kompilo de sufiĉe vasta politeknika vortaro por la ĝenerala uzado.

Por ke la vortaroj teknikaj ne estu koda kolekto — oni montru ilin en la funkcio de la viva vort-komplekso. Por tiu celo la Lingva Komisiono preparu materialojn por diversfakaj teknikaj ilustritaj legolibroj. Ĉe la kompilo de la legolibroj oni speciale akcentu ne sole teknikan flankon de la laboro, sed ankaŭ ĝian funkcion laŭ la principoj de la socialisma labor-aranĝo. Al ĉiu koncerna legolibro estu aldonita sistema vortareto.

La teknikaj vortaroj devas esti nepre provizitaj krom la

teksto en la rusa aŭ alia lingvo de USSR ankaŭ per tekstoj en la tri ĉefaj lingvoj de Eŭropo, por ke la nove enkondukitaj terminoj kaj vortkombinoj estu kompreneblaj aŭ alinacianoj kaj internacie kritikeblaj kaj uzeblaj.

Akelante la bezonojn de la amasa belliteratura kaj proletkoresponda laboro, la Lingva Komisiono de SEU preparu materialon por speciala modela metoda gvidilo por la esperanto-tradukistoj. Grava atento en tiu gvidilo estu donota al la kolektiva brigada traduk-laboro, kun apliko de socialisma konkurado.

Akelante la bezonojn de la nesufiĉe spertaj tradukistoj la Lingva Komisiono de SEU aranĝu specialan recenzo-kontrolan servon, kun spertaj konsultantoj, kies praktika laboro devas poste esti utiligenda por diversaj teoriaj organiz-deduktoj.

Akelante la bezonojn de la esperanto-pedagogoj la Lingva Komisiono de SEU konduku sisteman kolektadon kaj prilaboron de la instru- kaj edukmaterialoj, komisiintion al spertaj pedagogoj marksanoj. La materialoj kun necesaj konkludoj estu de tempo al tempo publikigataj en la gazeto «Internacia lingvo».

Se troviĝos ebleco — preparo de kómpleta instrugvida metoda verko estu efektivigota kiel eble plej baldaŭ.

Akelante la bezonojn de la amasa uzantaro de esperanto, la Lingva Komisiono de SEU aranĝu surpaĝoj de «Internacia Lingvo» specialan fakon por la lingvo-konsultado. Samtempe la Komisiono aranĝu vivan konsultan fakon, kiu povus doni kontraŭ pagitaj afrankoj respondojn al ĉiuj lingvaj demandoj de apartaj personoj aŭ organizaĵoj, dezirantaj tujan aŭ senperan respondon.

Akelante la intereson pri esperantaj teoriaj demandoj inter la laboruloj, la Lingva Komisiono de SEU laŭeble aranĝu publikajn prelegojn kaj diskutojn.

Kiel nepra kondiĉo de la plua ekzisto de la Lingva Komisiono estu vasta kaj siatempa publika informado pri ĝiaj laboroj kaj planoj kun eventualaj diskutoj.

Ĉar la problemo de la estonta monda lingvo estis prognoze starigita de k-do J. Stalin ĉe la XVI-a kompartikonferenco kaj komencis esti vigle pristudata de la sciencaj lingvistaj rondoj, kaj ĉar laŭ la opinio de la Lingva Komisiono de SEU neniu taŭga solvo por tiu estonta monda lingvo povus esti trovebla ekster la trakto de la nuna internacilingva problemo, kaj speciale de la esperanta problemo — tial necesas kela Lingva Komisiono de SEU aperu ankaŭ kiel publika faktoro en la pridiskuto de la nomita grava problemo, proksime ligita kun la praktika problemo de la ĝenerala lingvoraciigo.

Estas tre rekomendinde ke la Lingvokomisionanoj studu kaj sekvu evoluon de la marksisma lingvo-scienco kaj sin armu per tute modernaj scioj el la lingvistiko.

La samaj bezonoj publikaj devigas la Lingvan Komisionon de SEU subteni plej proksiman kontakton kun ĉiuj specialaj lingvo-institucioj kaj lingvo-organoj de USSR kaj eksterlando, publike batalante kun ĉiuj bagateligaj traktoj de esperanto kaj ĝia praktikado, kontraŭ ĉiuj idealismaj aŭ oportunismaj teorioj, lerte sin kaŝantaj sub la masko de la marksism-leninisma frazeologio.

La Lingva Komisiono de SEU eltrovu forton por jam nun komenci preparadon de novaj kontingentoj de la marksisme pensantaj kaj analizantaj esperantologoj, al kiuj ĝi siatempe transdonu laŭgeneracie siajn laborojn kaj taskojn. Por tiu celo la Lingva Komisiono klopodu ĉe aŭtoritataj centroj organizon de specialaj profesoraj katedroj en specialaj superaj lernejoj, traktantaj la disciplinon de kosmoglotiko kaj esperantologio.

Lingva Komisiono de SEU

---

## ESPERANTO KAJ DIALEKTIKO

### I

#### Facileco de esperanto

Ĉiuj esperantistoj bone scias, ke ellerni esperanton estas multe pli facile, ol iun ajn alian lingvon kiel eŭropan, tiel ankaŭ azian. De kio do dependas tiu ĉi facileco aŭ facila lernebleco de esperanto?

Ĝi dependas de tio, ke esperanto estas esence konstruita laŭ la leĝoj de la materialisma dialektiko. Alivorte la dialektiko de ĝia strukturo kiel eble pleje «respeguligas» la dialektikon de la «aĵoj»...

### II

Kio estas la materialisma dialektiko?

La dialektiko signifas esence «arto disputadi» aŭ «kontraŭdiri». Tiamaniere oni komprenis la vorton en antikva Grekio, kie la «arto disputadi» disvolviĝis ĝis tre alta grado.

Ĝis komenco de la XIX jarcento la dialektiko preskaŭ ne moviĝis antaŭen... Antaŭen puŝis ĝin pluen Hegel, glora germana filozofo (1770—1831). Li unuafoje deklaris ĝin la leĝo, aŭ la metodo, per kiu estas kreita la tuta mondo, same la materiala naturo kaj la spirita idearo. Pli verdire, en siaj verkoj li donis la idealisman filozofian sistemon, laŭ kiu «la absoluta spirito, kreinto de la mondo»

(t. e. dio), estas vera kaj sola esenco de ĉio ekzistanta, ĉion enpenetranta kaj ĉion stariganta; la materiala ekzisto estas lia enkorpiĝo; la homa penso ankaŭ estas lia prezento kaj esprimo. Tute kompreneble ĉe tiaj kondiĉoj unu sola dia leĝo enpenetradas ĉion ekzistantan kaj tiu leĝo estas la dialektiko, t. e. «ĉiama kaj ĉiea kontraŭdiro». Ĉio ekzistas kaj moviĝas dank'al ĝia interna lukto, aŭ batalo... Nenio sen ĝi, nenio ekster ĝi de la komenco ĝis la fino kiel space, tiel tempe ktp...

Marks kaj Engels forpuŝis ideon pri «la absoluta spirito, kreinto de la mondo». La naturo, la materia mondo estiĝis per si mem kaj ekzistas sen ia ajn fremda enmiksiĝo. Ne la spirito kreis la materion kaj ĝiajn «aĵojn», sed la lastaj kreis kaj kreas la homan spiriton, kiu estas plej alta esprimo de la ĉio ekzistanta. «Ĉio ideala estas nenio alia, ol la materialaĵo, translokigita en la homan Kapo'n kaj transformita en ĝi», — diras Marks. «Unueco de la mondo», — diras Engels, — «konsistas ne en ĝia ekzisto, sed en ĝia materialeco... La movo estas la ekzistofomo de la materio. Nenio kaj neniam ekzistis kaj ekzistas materio sen movo, aŭ movo sen materio... La penso de kaj scio estas produktoj de la homa cerbo sammaniere, kiel la homo estas produkto de la naturo, disvolviĝinta en la natura medio kaj kune kun ĝi. Sekve la produktoj de la homa cerbo, estante finfine ankaŭ la produktoj de la naturo, ne kontraŭdiras ĉiujn leĝojn de la naturo, sed en tute konformas ilin»... Tial Marks kaj Engels plene forpuŝis la idealismon de Hegel, sed prenis la dialektikan metodon kiel bazan leĝon de la tuta materiala mondo.

### III

La leĝoj de la materialisma dialektiko

Laŭ Engels tiuj leĝoj estas jenaj:

1) transformiĝoj de la kvanto en la kvaliton kaj inverse,

2) reciprokaj enpenetriĝoj de la malaĵoj, kaj

3) neigoj de la neigoj.

Hegel montris la nomitajn leĝojn, kiel leĝojn de pensado de la absoluta spirito (aŭ dio). La materialisma dialektiko pruvas, ke ili estas leĝoj de la materiala naturo, kies parto estas la homa pensado.

Lenin, daŭrigante kaj disvolvante la materialisman, dialektikon, montris, ke la tri nomitaj leĝoj kuntiriĝas al unu sola leĝo, kiu estas «unueco de la malaĵoj». Por plia kompreneblo, ni prenos la difinon de Engels kaj per ekzemploj klarigos liajn tri leĝojn.

La kvanto en la naturo estas la materio, kiu, laŭ nunaj fizikaj doktrinoj, estas ĉie la sama elektromagnetaĵo, ŝarĝita aŭ pozitive, aŭ nee. Iomaj kvantoj de ĉi materio troviĝas en ĉiu atomo, sed en ĉiu atomo en malsama nombro kaj malsama reciproka dislokiĝo. Tio difinas la malsamajn kvantitojn de diversaj atomoj. Ĉia ŝanĝo de ĉi dislokiĝo aŭ nombro nepre donas novajn kvalitojn aŭ ecojn de novaj atomoj (aŭ de iliaj amasoj). El ĉi tio eliĝas ĉia malsameco de la naturo — ĉiam kaj ĉie...

Sekve tie ĉi troviĝas ankaŭ malsameco de la «neorganisma» kaj «organisma» naturo, de la kruda materio kaj de la homa penso. La materio estas ĉie kaj ĉiam la sama; diferenco konsistas en ĝia kvanto kaj dislokiĝo, — pli vere diri, en ĝia reciproka movado...

Por klarigi la diriton, ni donu la antikvajn ekzemplojn, kiujn donis ankaŭ Hegel en sia «Logiko».

Se oni almetas al unu greno la alian, poste la trian, kvaran ktp, oni ne formas «amason da grenoj». Sed finfine aperas la momento, kiam la almeto de unu nova greno formas la «grenamason»... Sammaniere elŝirante po unu haro el la homa kaphaŭto, ni komence ne faros ion rimarkeblan; sed finfine post elŝiro de unu nova haro la homo fariĝos kalvulo.

Aliflanke la samon ni vidas en la movado. Jen iu homo komence — simple iras, poste li rapide iras, poste

li kuras: kvantoj de movado donas novajn kvalitojn<sup>1</sup>. Akvo-movado en rivero mekanike movigas turbinon; la lasta movas dinamomaŝinon, kiu naskas novan elektroforton; la elektroforto siavice naskas novan energion — elektrolumon ktp.

Cie kvantoj de movado<sup>1</sup> estas aliaj kaj ili donas novajn movad-kvalitojn aŭ energiojn... Tia estas la unua materialisme-dialektika leĝo. La dua kaj la tria estas senpere kaj senrompe ligitaj kun ĝi, ĉar evidente la kvanto de materio ĉiam kaj ĉie faras kun la kvalito de movado la veran unuaĵon. Aliflanke ĉia difinita ŝanĝo de la materio donas konforman ŝanĝon de la movado, sekve ĉiu nova kuniĝo de ili formas novan «aĵon» kun novaj kvalitoj aŭ ecoj. Ĉio ĉi estas sekvo de tio, ke en ĉiu unuaĵo estas entenataj ambaŭ malsamaj elementoj (t. e. materio kaj movado, aŭ formo kaj enhavo), kiuj estas kontraŭaj unu al la alia kaj tial ili ĉiam «kontraŭdiras», aŭ «luktas» inter si... Finfine ni venas al unu sola leĝo de Lenin: «unueco de malaĵoj». La lastaj ĉiam kaj ĉie «batalas» inter si, disflorante per tio la vivon de ĉio ekzistanta, de la plej kruda ŝtono ĝis la plej delikata homa penso... Samtempe ĉia novaĵo ne estas la malnovaĵon, kiu siavice kaj siatempe ne estas antaŭaĵon.

Kiam ni semas grenon de hordeo, ĝi, post ioma tempo, donas kaŭlon kaj radikon de la kreskaĵo. La greno malaperis, aŭ «mortis», naskinte la kaŭlon kaj radikon; la lastaj tiamaniere ne estas la grenon. Sammaniere kiam la kaŭlo kaj radikoj donas novajn grenojn, ili mem pereas, sekigigas kaj mortas. Novaj grenoj ne estas tiamaniere la kaŭlon kaj radikon. Nova vivo forigis la malnovan. Sed siatempe ĝi ankaŭ ĉesiĝos, donante vivon al novaĵ

---

<sup>1</sup> Aldone netu, ke ĉiu nova kvanto de movado nepre havas, kie bazon, novan kvanton de elspzata materio...



kreskaĵoj kaj al novaĵ semoj... Ni vidas ĉiaman neigon de la malnovo, ĝian malaperon kaj aperon de la nova...

Alia ekzemplo. La greka filozofio estis idealisma: ĝi konfesis samtempan kaj sendependan ekziston de la korpo kaj de la animo. La filozofio de XVIII jarcento neis la grekan dualismon per sia vulgara materialismo, kiu konfesis nur la unu solan materion kaj ĝiajn kvantajn ŝangojn, al kiuj kvazaŭ altiriĝas ĉiuj ŝangoj en la naturo. La nuntempo aŭ marksisma (dialektika) materialismo siavice neas tiun ĉi vulgaran pure kvantan materialismon, ĉar ĝi konfesas, — kiel ni jam vidis, — krom la kvantoj ankaŭ la kvalitojn de la aĵoj... Kiel rezulto de la «batalo» inter la ambaŭ antaŭaj filozofioj aperis la nova filozofio, kiu neis ilin ambaŭ, depreninte de ili ĉion veran, kaj foriginte ĉion malveran... La nova sintezo donis novan vivon, perciginte la malnovan...

#### IV

#### La leĝoj de la pensado

Marks kaj Engels difinis la dialektikon kiel «la sciencan pri la ĝeneralaĵ leĝoj de la movado kaj disvolvado de la naturo, la homa socio kaj la homa penso».

Restas al ni montri, ke la homa pensado ankaŭ subiĝas al la tri donitaj leĝoj de la tuta naturo. Alivorte ni devas klarigi kio estas la materio (kvanto) de la homa pensado, kio estas ĝia kvalito (move) kaj kiamaniere ili ambaŭ «batalas» inter si, aŭ neas unu la alian, denante ĉiafoje novan sintezon kaj sekve, novan vivon... Antaŭ ĉio ni notu, ke pensi ni povas nur en formo de la lingvo. Ekster tio ni havas ion alian—ekzemple, imagon, deliron, ktp; la penson ni havas nur en lingva formo. Tial ni povas diri, ke parolante pri la pensado ni samtempe parolas pri la lingvo.

En la lingvo do estas kunigataj du elementoj: sonoj kaj pensoj. Sonoj estas materio de la lingvo, pensoj

estas ĝia movo. Alivorte sonoj estas formoj de la lingvo, pensoj estas ĝiaj enhavoj. Fine sonoj estas kvantoj de la lingvo, pensoj estas ĝiaj kvalitoj. Anstataŭ plua rezonado ni pruvi tion per ekzemploj.

En ĉiu homa lingvo ekzistas malgranda nombro da socie ellaboritaj sonoj, el kiuj konsistas ĉiuj vortoj de la konforma lingvo. Ĉiu el tiaj sonoj estas esprimata aŭ figurata per la socie starigita litero.<sup>1</sup> En individua prononcado la sonoj nepre diferenciĝas inter si. Sed tia diferenciĝo ne estas granda kaj grava. Aliel la homoj ne povus kompreni unuj la aliajn. Tio estas vera por ĉiuj lingvoj—certe, ankaŭ por esperanto.

En nia lingvo, eksemple, *b* estas simpla sono, aŭ sona kvanto, ne havanta lingvan sencon (aŭ nenion signifanta per si mem). Se ni aldonas al ĝi duan sonon (aŭ sonan kvanton) *o*, ni ricevas *bo*, kiu jam havas lingvan sencon, ĉar ĝi signifas parencecon, akiritan per geedziĝo. Aldonante trian sonon *r* ni ricevas *bor*, kiu esprimas ideon pri trufarado per konformia instrumento<sup>2</sup>. Aldonante kvaran sonon *d*, ni ricevos *bord*, esprimantan ideon de la tero, limiganta la akvon. Vi aldonu ankoraŭ *e*, poste *r*, poste—*o*; rezulte vi ricevos novajn vortojn aŭ ideojn pri ili, kompreneblajn por ĉiu esperantisto.

Estas evidente, ke ĉia ŝanĝo de la sonkvanto faras konforman penskvaliton laŭ strukturo de la donita lingvo. Tiel, sonkombinaĵo *buk* signifas en rusa lingvo *а р б о н* de ia speco (fago), en franca lingvo — *b e s t o n* (kapro), en angla lingvo — *l i b r o n*.

El tiaj sonkombinaĵoj konsistas ĉiuj homaj lingvoj. Ni povas analizi (dismembrigi) ĉiun lingvon en konforman nombron da vortoj, aŭ pli ĝuste — da *k o n c e p t o j* aŭ *i d e o j*. Ĉiu koncepto estas *s o c i e* difinita aŭ per-

<sup>1</sup> Aŭ per du, tri ktp. leteroj, kiel en franca aŭ angla lingvoj.

<sup>2</sup> *Bor* estas radiko de la konforma verbo—*bor-i*. Tamen la *ide o* estas jam plene esprimita per sona kombinaĵo *bor*.

ceptata laŭ ĝia senco (kvalito); sed formata ĝi estas i n d i v i d u e per kombinado de konformaj sonoj.

Konsiderante ĉiun lingvon kiel homan esprimilon ni trovos en ĝi du kategoriojn de konceptoj: 1) tiujn, kiuj tiel aŭ aliel «respeguligas» la n a t u r o n m e m kaj kiuj kutime formas lingvajn r a d i k o j n, kaj 2) tiujn, kiuj ludas pure lingvan rolon, aŭ havas g r a m a t i k a n signifon; ili estas afiksoj (aŭ prefiksoj, sufiksoj kaj finaĵoj). Ekzemple, koncepto *tabl* formas radikon; *et* en *tabl-et* estas sufikso; *o* en *tabl-o* aŭ *tabl-et-o* estas finaĵo. Ĉiu esperantisto bone scias ĉiujn afiksojn de esperanto kaj dum sia lingva praktiko nepre ilin uzas. Prefiksoj kaj sufiksoj servas por formi novajn vortojn el la radikoj (aŭ modifi la lastajn); la finaĵoj — por ligi la vortojn en propoziciojn, formante antaŭe tiel nomatajn «plenajn vortojn». La lastaj estas difinitaj per tio, ke ili havas specialan rolon (aŭ funkcion) en la propozicio (ekzemple, ili estas — subjekto, objekto, predikato, difinanta vorto ĉe ili ĉiuj ktp.).

La unua kategorio de konceptoj (la «naturkonceptoj» aŭ radikoj) ludas do en lingvo tute alian rolon, ol la dua (la gramatikaj aŭ lingvaj konceptoj): en la unua ni havas e s e n c a n parton de la lingvo, en la dua — ĝian l o g i k a n (gramatikan) parton. Alivorte en la unua kategorio enestas u n u e c a j ideoj (konceptoj) pri la naturo kaj ĝiaj ecoj; en la dua: 1) a p a r t a j lingvoideoj (lingvokonceptoj) — t. e. prefiksoj kaj sufiksoj, kaj 2) ĝ e n e r a l a j lingvoideoj (lingvokonceptoj) t. e. finaĵoj. Ilia reciprokan interrilaton aŭ agadon ni komprenos el jenaj ekzemploj.

*Hom*, *vort*, \* *vagon* ktp estas u n u e c a j ideoj (aŭ konceptoj). Aldonante al ili apartan ideon (koncepton) *ar* ni ricevos *hom-ar* *vort-ar*, *vagon-ar*. Tiuj ĉi ideokombinaĵoj ne estas ankoraŭ «plenaj vortoj». Por tio necesas aldoni ankoraŭ ĝ e n e r a l a n ideon (koncepton) *o*. Tiam ni havos tri substantivojn, aŭ «a ĵ o v o r t o j n», kiuj povas esti enmetataj en la propozicion por ludi en ĝi tiun aŭ alian rolon.

Alia ekzemplo. El unuecaj konceptoj *bon, nov, mol* ktp ni formas novajn ideokombinaĵojn, aldonante al ili ĉiujn apartajn konceptojn, aŭ sufiksojn *ec, aĵ, eg* ktp. Ni ricevos: *bon-ec, bon-aĵ, bon-eg, bel-ec, bel-aĵ, bel-eg* ktp. Aldonante denove ĝeneralajn konceptojn *o, a, e* ni ricevos plenajn vortojn *bon-ec-o, bon-aĵ-o, bon-eg-a, bel-ec-o, nov-aĵ-o, mol-eg-e*. Kiel ni scias, en esperanto la finaĵo *o* formas ĉiujn substantivojn aŭ «aĵovortojn», la finaĵo *a* — formas ĉiujn adjektivojn, aŭ «ecovortojn», la finaĵo *e* formas ĉiujn adverbojn, aŭ verbajn ecovortojn. Ĝuste pro tio ili estas ĝeneralaj konceptoj<sup>1</sup>. La sufiksoj *ec, aĵ, eg* kaj ĉiuj aliaj sufiksoj ankaŭ la prefiksoj *bo, ge* ktp ludas multe pli mallarĝan rolon, ĉar ili povas esti aldonataj nur al iuj radikoj, laŭ ilia senco. Pro tio ili estas nur apartaj konceptoj. Kaj la radikoj montras ĉiam nur unu solan esencan koncepton, aŭ ideon; tial ili estas unuecaj konceptoj aŭ ideoj.

Tiamaniere la «natura» de la tri nomitaj kategorioj de konceptoj estas malsama. Ili ĉiuj «kontraŭstaras», aŭ «kontraŭdiras» unuj al la aliaj. La «lukto» aŭ «batalo» inter ili donas «vivon» al ĉiu vorto kaj samtempe kontraŭstarigas ĝin al aliaj vortoj de la propozicio. Ĉiu propozicio estas «unuaĵo de kontraŭaĵoj», reflektanta la konforman «unuaĵon de kontraŭaĵoj» en la naturo. Kiam ni parolas ekzemple «en USSR la proletaro nenigis la burĝaron», ni reflektigas tion, kio fariĝis en la «natura» mem. Subjekto «la proletaro» agis en la naturo kontraŭ la objekto, — «la burĝaro», kaj «nenigis» ĝin. Gramatikaj formoj *o* (subjekto), *n* (objekto) montras ilian interagadon; ideo *neni* montras «formon» de la agado; ideo *is* — montras pasintecan de la agado... La samon ni vidas en ĉiu propozicio. Rezulte, «la dialektiko de la aĵojnaskas la dialektikon de la ideoj»

<sup>1</sup> Ĉiuj esperantaj finaĵoj (t. e., krom la nomitaj, ankoraŭ: *i, n, j, as, is, os, us, u*) estas la samaj ĝeneralaj konceptoj.

## La materialisma dialektiko en esperanto

Lenin en siaj rimarkoj ĉe legado de la «Logiko» de Hegel<sup>1</sup> interalie skribis tian aforismon: «Hegel efektive pruvis, ke logikaj formoj kaj leĝoj ne estas malplenaj kovriloj, sed reflektadoj de la objektiva mondo. Pli vere, li ne pruvis, sed genie divenis tion»<sup>2</sup>. La samon ni rajtas diri pri Zamenhof: li ankaŭ genie divenis ligon inter la naturo kaj la homa idearo. Tial la dialektiko de la homaj ideoj en esperanto estas kiel eble plej ĝusta «respeguliĝo»<sup>2</sup> de la dialektiko de la «aĵoj».

Certe ĉiuj homaj lingvoj pli aŭ malpli faras la samon. Aliel ili ne povus ekzisti kaj disvolviĝi. Sed ĉiu homa lingvo kreskis kaj disvolviĝis blinde, aŭ kvazaŭ per si mem simile al kresko de arboj aŭ bestoj. La homa racio kvazaŭ entute ne laboris ĉe ilia kreskado. Tial oni nomas ilin ordinare «naturaĵ lingvoj». Male al tiuj lingvoj — esperanto ĉe sia ekestigo en sia esenca parto, estis kreita de la genia homa racio, kreita konscie kaj laŭplane... Sekve tiu genia homa racio povis doni al sia kreago, en tuta ĝia esenco, trajtojn kaj leĝojn, necesajn por ĝia plena kaj plej efektiva funkciado.

En kio do esprimiĝis tiuj trajtoj kaj leĝoj, kiuj finfine transportis en esperanton la dialektikon de la naturo kaj sekve faris el ĝi kiel eble plej veran dialektikon, «spegulon de la naturo»?

Zamenhof antaŭ ĉio genie kreis plenan planon de sia lingvo. Li ne disvolvis detalojn, lasante ilin al la uzon-

<sup>1</sup> Ili estas eldonitaj en rusa lingvo en la «IX-a Lenina artikolaro», Moskvo 1929, Paĝe 199.

<sup>2</sup> Ideon pri tiu «respeguliĝo» ni ne povas esence klarigi tie ĉi. Certe, ĝi ne estas rekta «respeguliĝo», kiel realaj objektoj refsobktas en spegulo; ankaŭ ĝi ne estas rekta reflektiĝo de la samaj objektoj en la homa cerbo pere de sentorganoj: ĝi estas pure kondiĉa simbologado de la lastaj reflektiĝoj en sonkombinaĵoj...

toj: li donis nur leĝojn de sia lingvo aŭ ĝian principaron, kaj plej necesan vort-materialon. La bazo leĝo de esperanto, kiu garantiis al ĝi plenan vivon, estis esprimata de Zamenhof per jenaj vortoj en lia unua libro:

«Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn tiel, ke la tuta lingvo anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj».

En tiu ĉi tre simpla formulo estas esprimita la tuta esenco de esperanto, ĝia dialektika naturo, dank'al kiu ĝi tuj fariĝis kiel eble plej vera «spegulo» de la natura dialektiko.

Efektive, ne troviĝas eĉ unu alia lingvo, kies konsisto povus esti plene kaj senescepte lokigita en vortaron, per kio la gramatiko fariĝas esence superflua. Ĉi eco apartenas nur al unu sola «artefarita» esperanto. Kaj en tiu eco enestas la solvo de la vera lingva dialektiko.

«La tuta lingvo konsistas el senŝanĝaj vortoj»!.. Jen estas ĉi solvo!!

Efektive, se ne nur «naturvortoj», aŭ «radikoj», sed ankaŭ la «logikvortoj», aŭ «afiksoj» estas en esperanto «plenaĵ senŝanĝaj vortoj», sekve en ĉiu el ili ĉiam la «sonokvanto» estas senrompe ligita kun «senco-kvalito». Tiamaniere neniu povas doni al tiu aŭ alia esperanta vorto ian sonan ŝanĝon sen samtempa ŝanĝo de ĝia kvalito, kaj inverse.

Engels en sia «Dialektiko de la naturo» interalie rimarkis, ke la tuta naturo konsistas el «saltoj»<sup>1</sup>, ĉar la plej malgranda ŝanĝo de la materio (kvanto) faras jam konforman ŝanĝon de la movo (kvalito): la ŝanĝo de la kvanto donas konforman «salton» de la kvalito. Tiu ĉi natura leĝo troviĝas ankaŭ en la esperanta lingva «spegulo». Doninte nur malgrandan «ekzemplan» radikvortaron, Zamenhof donis plenan kaj bonegan sistemon (tabelon) de la afiksoj. La tabelo de la afiksoj dum posta tempo estis nur iomete komple-

<sup>1</sup> Termino «salto» estas termino de la Hegela «Logiko».

tigita per prefikso *mis* kaj sufiksoj *ac*, *end*, *ism*. Krom tio la sufikso *uj* (plej maltrafa en la tuta tabelo ĉar ĝi sola havas tri sencejn) estis certgrade modifita.

Dank'al tiu ĉi bonega afiksaro, esperanto ne nur donas eblon ĉiel modifi ĉiun radikon, ĉiarilate kaj ĉiaflanke reflektante konforman dialektikon de la naturo, sed treege malgrandigas la vortaron de la lingvo, per kio ĝi fariĝas tiel malgranda en sia esenca parto, — kaj sekve, tre facile *lernebila*. Aliflanke la nombro da afiksoj estas ankaŭ treege malgrandigita. Kompare kun multenombra kaj vere kaosa afiksaro de eŭropaj «naturaj» lingvoj, la esperanta tabelo estas kvazaŭ «infana ludilo». Sed tiu ĉi «ludilo» faras en la lingvo tiajn miraklojn, kreas tian vortaron riĉecon, pri kiu eĉ ne povas sonĝi niaj «lingvosaguloj». Unu el plej grandaj filozofoj de la mondo Leibnic, ankoraŭ en XVII jarcento, diris, ke «la riĉeco de la lingvo konsistas ne el multego da pretaj vortformoj, sed el facila vortformado aŭ el klaraj kombinaĵoj el kiel eble plej malgranda nombro da radikoj kaj aliaj vort-elementoj»...

Ĝuste tion ni vidas en esperanto.

Tio rilatas al la *apartaj* konceptoj de la lingvo. Rilate al ĝiaj ĝeneralaĵaj konceptoj (t. e. al finaĵoj), ni scias, ke tie ĉi la tasko estas solvita same genie, kiel en la jam montritaj partoj de esperanto. La nombro da finaĵoj estas nur dekunu, sed ili bonege esprimas ĉiujn interrilatojn inter plenaj vortoj en la propozicioj, tiamaniere respeguligante interrilatojn de la «naturaj aĵoj»... Certe, ili ricevas ĉe tio grandan helpon de la prepozicioj kaj konjunkcioj; sed ĉio estas koordinita kaj subigita laŭ la dialektiko de la tuta idearo, aŭ la tuta «aĵaro»...

Ĉu estas bezone aldoni ke la leĝoj pri «*reciprokaĵoj*» kaj «*neigoj de la malaĵoj*» kaj «*neigoj de la neigoj*» trovas plenan senesceptan aplikon en la tuta strukturo de esperanta parolado?

Ĉiu koncepto, ĉiu kombinaĵo de ili, ĉiu propozicio ktp estas ĉiam kaj nepre «*unuaĵoj de la malaĵoj*»,

en kio enestas solvo de la lingva vivo aŭ movo, «respeguliganta» konformajn aperojn en la tuta reala naturo...

La tutmonda praktiko dum 44 jaroj donas al la «dialektika naturo» de esperanto plĉj bonan pruvon. Ĉar ĉu efektive ĝi povus aliel transvivi la imperialisman militon, kaj ekricevi post ĝi nova veran impulson al nova vivo en la nova socialisma proleta mondo, servante por celoj de la tutmonda klasbata l'ado?!

Necesas ankaŭ atenti, ke ĝi egale servas por homoj de la tuta mondo, sendepende de iliaj gepatraj lingvoj, tiom malsamaj laŭ iliaj tipologioj aŭ strukturoj. Tio ĉi estas nova bonega pruvo de ĝia «dialektika naturo». «Respeguligante» la «dialektikon de la aĵoj», kiu estas la sama en la tuta mondo, ĝi egale servas al eŭropanoj, kun iliaj flektivaj lingvoj, kaj al ĉinoj kun ilia amorfa lingvo, kaj al la popoloj kun la aglutina tipologio.

Necesas ankoraŭ noti, ke la dialektika naturo de esperanto ne nur «respeguligas» la malnovan kaj pasintan historion de la homa idearo; sed pro fleksebleco de sia strukturo ĝi vaste malfermas pordegon de la estonto, kion faras neniu alia lingvo en la tuta mondo. Do ĝi pleje povos servi al la eltrovo de tiu (laŭ Stalin) «vojo», laŭ kiu estos kaj povos esti konstruota la estonta universala lingvo de la tutmonda unuigota homaro...<sup>1</sup>

---

<sup>1</sup> A. P. Andrejev en sia artikolo neniom tuŝas la ĝeneralan dialektikan evoluon de la lingvoj. En tiu evolua interbatalo 1) la kontraŭaĵoj—naciaj lingvoj kaj esperanto—formas esencan unuon, ĉar ili havas unuecan bazon en la moderna eŭrope-tutmonda tekniko kaj en la same eŭrope-tutmondaj terminaroj; 2) esperanto, kontraŭmetata al la naciaj lingvoj, estante ilia antitezo, kreskis el ilia kerno kaj finfine servos por ilia forigo; 3) la internacia helpa lingvo esperanto, neigonta la lingvojn, antaŭvidas sian propran estontan neigon, ĉar la lingvo unusola universala, akceptota kaj pluen evoluota, nepre serĉos novajn pli perfektajn vojojn, forigontajn la naciismojn, proprajn al la nuna esperanto, entenanta la elementojn de la nuntempaj lingvoj naciaj.

E. Drezen.



## ESPERANTO KAJ LA LINGVOJ DE MONDO

El ĉiuj projektoj de artefaritaj internaciaj lingvoj ne pereis kaj vivas nur unu lingvo esperanto. Nur ĝi havas ŝancojn de pluj sukcesoj, de plua evoluado.

Kia do estas klarigo por tiu fakto?

Ni scias la ĉefajn kvalitojn de esperanto: 1) internacieco de la komuneŭropa terminologio kaj vortaro, 2) la pleja simpleco de gramatiko. Ĉu la internacia helpa lingvo devas havi nepre tiajn kvalitojn?

Jes, tiajn.

La komuneŭropa teknika terminologio fariĝas, aŭ almenaŭ komencas fariĝi tutmonda. La kulturaj lingvoj de Azio alprenas ĝin pli kaj pli. La grek-latina terminologio, pro tio, ke Eŭropo iras antaŭ ĉiuj laŭ la vojo de teknika progreso, venkas ĉiujn siajn konkurantojn. Ĝi havis du konkurantojn, kiuj estis kaj ankoraŭ estas konsiderindaj: la terminologio araba kaj la terminologio ĉina. La araba lingvo estas speciale oportuna por farado de teknikaj terminoj (pro granda reguleco de sia vortderivado), kaj la arabaj terminoj estis vaste uzataj en ĉiuj lingvoj de la islamisma kulturo. La vortoj kiel *socijalisto*, *revolucio*, *ekonomiko* — ĝis nun ekzistas ĉe tiuj popoloj en araba lingva formo. Sed tiuj ĉi terminoj jam delonge bataladas kontraŭ terminoj de eŭropa latina deveno, plejparte en franca formo, kaj ekzemple la vorto *socijalisto* en persa lingvo nuntempe pli ofte jam estas uzata en la formo *socijalist*, ol en la araba formo *eŝteraki* (laŭsence: *sociiĝanto*). Preskaŭ sama estas la situacio de ĉina lingvo, alia grava fonto de terminologio. La ĉina terminologio utiliĝis kaj utiliĝas en Japanio kaj en aliaj

andoj de Malproksima Oriento. Kaj ankaŭ tie, precipe en Japanio, ni povas observi la alfluadon de eŭropaj terminoj en angla formo. La komuneco de kulturo kaj ĝia teknika bazo tiamaniere kreas mondampleksan komunecon de terminologio, komunecon de la granda parto de vortprovizo en la lingvoj. En malproksima estonto tiu ĉi akklaminda procedo ekhavas alian kvaliton: oni povos konsideri ĝin kiel ekiron al la komuna ununura monda lingvo. Dume tamen ankoraŭ la terminologia komuneco nur vortare kaj eĉ nur parte, unuigas la lingvojn, diversajn laŭ gramatika formo. Dume ankoraŭ devas daŭri la stadio de ekfloro kaj de plua disvolviĝo de tiuj ĉi naciaj lingvaj formoj. Sed la artefarita internacia helpa lingvo devas akceli tiun terminologian komunecon.

Tiel faris Zamenhof en sia esperanto. Li akceptis kiel ion jam donitan ĉiun ekzistantan en eŭropa komuna terminologio, kaj li sukcese evitis kolizion inter la bone prilaborita terminologio kaj pleje simpligita gramatiko. Tie, kie la pleje simpligita gramatiko kapablis liberigi nin de terminologia nereguleco, en esperanto ĝi efektive faris tion. Regule derivitaj vortoj: *i n s t r u i*, *i n s t r u a d o*, *i n s t r u i s t o* — utiligas unu konatan internacian radikon; same la vortoj: *r e d a k t i*, *r e d a k t a d o*, *r e d a k t i s t o*, *r e d a k t e j o*. La terminoj *v o r t o*, *v o r t a r o* — forigas nekonformecon de germana *Wörterbuch* kaj angla *dictionary*, franca *dictionnaire*, kiu ekzistas flanke de komuneco de germana *Wort* kaj angla *word*. En tiuj ĉi ekzemploj la gramatiko farigas kvazaŭ regulilo de la vortaro, malpligrandigante ĝian bazan provizon de radikoj. Tio ĉi estas precipe utila por tiuj popoloj, en kies lingvojn la komun-eŭropa terminologio nur eniras aŭ komencas eniri, t. e. por la popoloj de islamisma kaj malproksim-orienta kulturaj rondo. Tio ĉi permesas al ili, ne rompante la terminologian komunecon kun Eŭropo kaj Ameriko, plifaciligi por si la aferon de alproprigo de internacia vortaro.

Ni vidas ke esperanto en sia vortaro estas ĝuste tia, kia devas esti racie konstruita helpa internacia lingvo de nia epoko. Tio ĉi garantias ĝian sukceson.

Sed kiel staras la afero rilate al la gramatika strukturo de Esperanto?

Ĝi estas pleje simpla. Eble, tio eĉ sufiĉas. La internacia helpa gramatiko devas esti simpla. En la epoko de kreado de volapük kaj esperanto tiu ĉi simpleco de gramatiko estis komprenata kiel simpleco, kaj nenio alia. Ĉiuj vidis en tiu ĉi simpleco praktikan sencon, opiniis, ke la simpleco estas praktike pravigita kaj ke tio sufiĉas. Ĝia lingvistika senco, ĝia lingvistika pravigo restis nerimarkita. Ĝi eĉ povis esti nerimarkita ĝis kiam en la nova lingvistiko ekskiziĝis la solvo de problemoj pri la stadia evoluado de ĉiu lingvo k de ĉiuj lingvoj de mondo. Per tio ĉi estis lumigita la tipologio de la nun ekzistantaj en la mondo lingvoj, aperis la ebleco prijuĝi la problemon pri la disvastiĝo kaj pliofteco de la diversaj lingvaj tipoj sur nia terglobo, kaj en diversaj sociaj k geografiaj kondiĉoj de la homaro.

La nuntempa stato de niaj konoj pri lingvotipoj kondukas nin al la konkludo, ke ekzistas la amorfa, aglutina kaj fleksia stadioj de la lingvo. Tamen tiuj stadioj travivas unu la alian laŭ la dirita kronologia sekvo. Ne ekzistas lingvaj «familioj» deĉiam fleksiaj aŭ deĉiam aglutinaj. La procedo de traĵiro el unu stadio en la alian (precipe en la lingvo) estas komplikigata per la amasiĝo en ĉiu lingvo de la jam ŝtoniĝintaj postvivaĵoj de ĉiu antaŭa stadio. En ĉiu lingvo ekzistas tiamaniere «multstadieco». La stadioj ambaŭflanke trairas unu la alian, kaj nur ekturnaj momentoj de lingvaj krizoj transigas lingvon plej difinite el unu stadio en la postan.

Kaj oni devas atentigi, ke, kvankam la fleksio kronologie ĉiam postsekvas la aglutinon, tamen tio tute ne signifas, ke la fleksia lingvo nepre laŭ struktura vidpunkto estas pli komplika, ol la aglutina. Povas esti male. La menciitaj tri stadioj baze rilatas al la dividebleco de la parolo.

sekvante la komunan linion de evoluado de la lingvo for de la nedividebla duonanimala krio ĝis la plej dividebla parolo de la nuntempaj kulturaj popoloj. La pligrandiĝo de dividebleco konformiĝas kun la kreskado k diferenciĝo de parolaj komunikaj bezonoj, kiuj siavice staras sur la bazo de ekonomia progresado, kaj en nia epoko speciale sur la pligrandiĝanta kolektiveco de la maŝtrumado, revolucie refarata. En la amorfa stadio ni havas preskaŭ la tutan vortprovizon de la lingvo en la forno de neŝanĝeblaj vortoj; en la aglutina stadio ni ankoraŭ havas grandan kvanton da stabilaj nedivideblaj aŭ apenaŭ-divideblaj lingvaj elementoj kun universala signifo (afiksoj). Fine, transirante al la fleksio, ni preskaŭ entute perdas tiun ĉi provizon de universalaj afiksoj, kaj ĉiuj elementoj de la lingvo disfalas je apartaj kombineblaj unu kun alia sonoj (fonemoj). Tia estas la evoluado de la sona dividebleco de parolo; kun ĝi paralele evoluadas ankaŭ la senca dividebleco. Ĉe la aglutino la aliigo de senco rezultas per la kombinado de la elementoj, kiuj havas la karakteron de memstaraj afiksoj (kvankam povantaj enhavi nur unu sonon), ligitaj kun konstanta signifo. Ĉe la fleksio la ŝelo de la memstaraj formantaj afiksoj eksplodas, kaj plejparte perdiĝas la konstanteco de ilia signifo. Aperas multeco da tipoj de formantaj afiksoj, la komplikeco de iliaj reciprokaj kombinoj, multeco da tipoj kaj komplikeco en la sistemoj de deklinacio kaj konjugacio. Sed sammomente komenciĝas la procedo de mortiĝo de la parto de tiaj eksplodintaj kaj detruitaj afiksoj, kaj tio precipe kiam helpas la lingva intermiksiĝo (la angla, la persa lingvoj) — povas rezultigi la neniigon de la plejparto de formantaj sistemon fleksioj, kaj kiel pluan sekvon — denove la plisimpliĝon de gramatiko. La angla lingvo restas fleksia, ĝi estas ĝisfine dividibla je apartaj sonoj, ĝi konservas eĉ post-restaĵojn de multeco da tipoj de deklinaciaj kaj konjugaciaj paradigmoj, sed ĝi jam estas simpla laŭ sia gramatika strukturo, kaj pli simpla, ol multaj aglutinaj lingvoj.

Ĉiuj tri menciitaj stadiaj lingvaj tipoj nun ekzistas en la mondo. Ekzistas ankaŭ la formoj, mezaj inter ili. Jam ne ekzistas ĉe la nuntempa homaro lingvoj, en kiuj la sona dividebleco ankoraŭ ne atingis la limojn de aparta vorto. Tia stadio devis esti antaŭ la stadio de niaj amorfaj lingvoj, sed ĝin certe jam trairis ĉiuj lingvoj. El la ekzistantaj nun tri stadiaj tipoj ĉe la popoloj de eŭropa kulturo dominas la fleksio. La mondo de la lingvoj aglutinaj kaj amorfaj geografie ĉirkaŭprenas preskaŭ entute la aliajn kontinentojn: Azion, Afrikon, aborigenojn de Ameriko kaj Polinezio. Neegala rapideco de lingva evoluo rezultigas tion, ke dum unu certa epoko povas samtempe apud-ekzisti lingvoj de malsamaj stadioj. Riĉiĝante en vortaro kaj eĉ en gramatiko per intermiksiĝo kun aliaj lingvoj de alia aŭ la sama tipo, la lingvo eĉ de amorfa tipo povas fundamente porlonge konservigi sian strukturon, plenan de praa primitivismo. Jam la historiaj kondiĉoj instigas al tiu konservigo de la lingva formo. Frue evoluinta klasa socio, frua formiĝo de speciala skriba lingvo de dominanta klaso, iafaje transformiĝo de tiu lingvo je lingvon «internacian» — tiaj estas la faktoroj de la lingva konservigo, kiujn ni observas ekzemple en la ĉina lingvo, kiu estas fundamente amorfa. En tiaforme konservigita lingvo la stadio de socia evoluo, la adapto de ĝia senca enhavo daŭras. La lingvo, sur la vojoj de intermiksiĝo kun aliaj lingvoj, prenas el ili ĉion, kion bezonas la parolantoj. Alilingvaj elementoj subfosas konservigitan arkaikan strukturon. La faktoroj de konservigo kontraŭstaras ilin, sed la traĭro de la lingvo en alian postan stacion povas esti nur prokrastita, sed ne evitita. Samtiel en la ĉina lingvo amasiĝas multaj elementoj de aglutino, vortoj fariĝas stabilaj afiksoj. Tamen, ĉar en la ĉina lingvo ĝis nun firme staras kaj vive sentiĝas la unueca gramatika principo de vortpozicio (la sola en la amorfa stadio principo de unuecigo de frazo) — ni diras ke baze la ĉina lingvo ankoraŭ ne estas aglutina. La kvalita transiro de amorfeco al aglutineco ankoraŭ ne okazis, ĝi okazos

tiam, kiam la leĝon de vortpozicio por la unuecigo de frazo anstataŭigos leĝoj pri deviga kunligo de radikoj kun certaj afiksoj.

Kia do estas la pozicio de esperanto en la nuntempa lingva mondo inter la lingvoj de tri priparolitaj tipoj?

Ĝia rilato al la fleksiaj lingvoj de Eŭropo estas sufiĉe pristudita kaj konata. Ĝia rilato al la ekstereŭropaj lingvoj, precipe al la kulturaj lingvoj de Azio, ankoraŭ tute ne estas klara por la esperantistoj. Se tiu ĉi problemo estas sufiĉe pripensita, neniu esperantisto forirus de espektanto al post-esperantaj sistemoj de artefaritaj lingvoj, romence de ido kaj ĝis la lasta lingvo de Jespersen (Novial), kaj Jespersen mem direktus sian eltrovemecon aliloken.

La specifo de ĉiuj post-esperantaj sistemoj vidiĝas en tio, ke ili ĉiuj celas pli, ol la lingvo de Zamenhof, la konatan «tujan kompreneblecon» (de kiuj?) — de eŭropanoj. La plejparto de tiuj ĉi sistemoj forigas la unuecan tipon de akcento, nur pro tio, ke la esparanta akcento-tipo ekzemple en la vorto *n a c i o* konformiĝas nek kun la franca, nek kun la angla, nek kun la germana, nek kun la rusa, aŭ, en la vorto *a b o n i* la akcento estas ne tie, kie ĝi estas en la konforma franca vorto. Per same gravaj «principaj» konsideroj oni devas ekspliki ankaŭ la ĉiamajn provojn kaj penojn plikomplikigi la sistemon de verbaj tempoj, kaj precipe la ridindajn klopodojn diferencigi pronomojn sekse, kaj la reakcian sopiron, kiu tiras al la anstataŭigo de *p a t r i n o* per *m a t r o*. Ĉi ĉiuj novaj lingvoj firme estas orientitaj eŭropan, samtempe ne atentante gramatikajn sistemojn de ekster-eŭropaj lingvoj, kaj eĉ de kelkaj malgrandaj eŭropaj lingvoj. Tiuj lingvo-sistemoj subiĝas al la eŭroplingvaj tradicioj — eĉ kiam tiuj ĝenas la regulecon de la artefarita lingvo kaj malfaciligas ĝian studon por ekstereŭropanoj.

Tiel ekzemple en ido — ia substantiva finiĝo *o* por landaj nomoj estas ŝanĝata je *a*. En Occidental estas akceptata ŝanĝo de radika sono kaj litero *d* per *s* ekzemple pretend-*r*e

(pretendi), pretens-ion (pretendo). Tiusence oni povas konsideri tiujn ĉi «internaciajn» lingvojn imperialismaj rilate al la lingvoj de «koloniaj» popoloj.

Tamen, la internacia lingvo, por ke ĝi estu efektive internacia, ne povas enhavi en sia gramatiko iajn apartigajn elementojn de eŭropa imperialismo. Tiaj kategorioj, kiel gramatika genro, esprimo de objekto kaj subjekto, verbaj formoj en la internacia lingvo devas esti kvazaŭ komuna fokuso de tiuj fenomenoj en plej diversaj lingvoj de la mondo. Same kiel oni ne povus enkonduki en internacian gramatikon ekzemple la klasifikon de objektoj de universo laŭ ses klasoj, kiu ekzistas en la ĉeĉena lingvo, — same oni ne devas enkonduki kopiitajn de eŭropaj specimenoj verbajn tempojn aŭ seksajn diferencojn en pronomoj. Sed la gramatiko de internacia lingvo devas esti konstruita tiamaniere, ke ĝiaj normoj estu same kiel eble proksimaj je ses ĉeĉenaj klasoj kaj je la franca seksa klasifiko de pronomoj. Tio ĉi estos la ĝusta punkto, la ĝusta fokuso, kien kunvenas la radioj de ĉiuj nuntempe ekzistantaj lingvaj tipoj.

Zamenhof komprenis tion — komprenis tute instinkte — kaj tio estas lia plej grava merito, tio garantias por esperanto ĝian nuntempan situacion de la sola viva internacia lingvo, kaj certagrade garantias ĝian pluan evoluadon. Efektive la gramatikon de esperanto oni povas agnoski, kiel tia fokuso de «monda» gramatiko, kien kunvenas ĉio fundamenta, kio estas en la lingvoj de mondo gramatike necesa por nia epoko, kaj kien maltrafas ĉio, kio estas nur ŝtoniĝinta restaĵo de estinto.

Oni bezonas pruvi tiun aserton. Oni povas klarigi la pruvon mallonge, aŭ disvolvi ĝin plej detale. Tie ĉi ni penas doni la plej mallongan formon de pruvo, por kio estas necese, unuflanke — rememori la lingvajn tipojn de Azio kaj Afriko, precipe de tiaj kulturaj lingvoj, kaj aliflanke — rememori la manieron de solvado de ĉefaj gramatikaj problemoj en esperanto.

Ni karakterizu tipojn de jenaj lingvaj grupoj:

1. Lingvoj: persa, taĝika, puŝtu (afgana), kaj ĉefaj novhindaj lingvoj (bengali kaj urdu). Ĉi tiuj lingvoj estas fleksiaj, sed en multaj el ili oni povas facile observi restaĵojn de la antaŭ-verba stadio de evoluado (necerta semantiko de verbo rilate al aktivo kaj pasivo). La gramatika genro aŭ forestas, aŭ ĝenerale estas pli simpla, ol en eŭropaj sistemoj.

2. Lingvoj turkaj, mongolaj, finnaj — klasika ekzemplo de aglutino. Ekzistas restaĵoj de antaŭ-verba strukturo (iam forestas la tria persona formo de verbo). Foresto de gramatika genro.

3. Lingvoj araba kaj hebrea — fleksiaj kun gramatika genro, kun rimarkinda reguleco de riĉa vortfarado.

4. Lingvo ĉina — amorfa, sed en siaj konversaciaj dialektoj sufiĉe proksima al aglutino. Klara antaŭ-verba strukturo (verbo forestas). Gramatika genro ne ekzistas.

5. Japana lingvo — aglutina, tute konservinta la antaŭ-verban tipon (verbo forestas). Gramatika genro ne ekzistas.

6. Lingvoj: malaja, polineziaj, de bantu-negroj kaj de sudanaj negroj (en Afriko). En diversaj gradoj de amorfa kaj aglutina strukturo, preskaŭ ĉiam tute antaŭ-verbaj. La lingvoj bantuaj speciale estas specifiĝintaj per riĉe disvolviĝinta sistemo de klasifiko de objektoj de universo, kiu sin reflektas en ilia gramatiko.

7. Lingvoj de Kaŭkazo (inkluzive oseta k moderna armena) kaj lingvo baska. La verba formo en tiuj ĉi lingvoj estas centro de frazo kaj posedas ŝajnan troan komplik-econ, sed fakte ĝi estas nur kombinacio de neverbaj elementoj. Kelkaj el tiuj lingvoj parte (enkelkaj verbo-tempoj) evoluigis la verban strukturon.

La lingvoj de aborigenoj de Ameriko apartenas parte al la sesa, parte al la sepa de ĵus menciitaj grupoj, sed por tiuj popoloj la bezono je internacia lingvo antaŭiras la bezono ellerni anglan, hispanan, aŭ portugalan lingvojn. En analogia pozicio estas ankaŭ la malmultenombraj po-



poloj de la ekstrema Nordo. Inter la priparolitaj grupoj ni ne menciis ankaŭ lingvojn de Suda Hindio, HindaĈinio kaj Tibeto, sed tiuj lingvoj aldonus nenion novan al la ĝenerala tipologia bildo.

Ĉio fundamenta, pri kio ni parolis, estas efektivigita en la gramatiko de esperanto: forestas laŭ-persona konjugacio, forestas gramatika genro.

Estas granda profito de esperanto, ke en ĝi forestas verba konjugacio laŭ-persone. Tia estas la stato en multegaj lingvoj de la mondo, eĉ iaforte en lingvoj fleksiaj (la angla pasinta tempo). Lernante esperanton, lingvanoj kun forte evoluinta personeca verbo ne havas ian malfacilecon je alutimiĝo al la neesprimo de personaj pronomoj, ĉar oni ĉiam povas facile transiri de la plia komplikeco al la plia malkomplikeco de internacia lingvo. La mala stato estus ja granda kaj superflua malfaciligilo por la amaso da parolantoj la lingvojn, en kiuj ne ekzistas la personeca verbo, kaj kiuj konservas ĉi-staton, kiel postrestaĵo de antaŭ-verba stadio de lingva evoluado. Tiaj interalie estas la ĉina kaj japana lingvoj, kies strukturon oni nepre devas atenti, kreante artefaritan lingvon, kiu celas esti internacia. Sed ĉie ekzistas la ebleco de kunmeto de personaj pronomoj kun verbo — tio estas ankaŭ en esperanto.

Sed jen — la akuzativo ne ĉie ekzistas, same kiel ne ĉie oni trovas deklinacion ĝenerale. Ĉu ne estas pravaĵoj kritikantoj de esperanto, celantaj per tiom da saĝoj kontraŭ la akuzativo? Neniel. Ĉiuj kritikantoj kritikis tiun punkton nur pro la foresto de la speciala formo por akuzativo en la franca kaj angla lingvoj, t. e. de la vidpunkto de la gvidantaj eŭropaj imperialismaj nacioj. Ili ne pritraktis tiun problemon pli vaste, en tut-lingva amplekso, kaj ili eĉ ne povis tion fari, ĉar tiam ili trafus tute aliajn fenomenojn. Antaŭ la akuzativo en la antaŭ-verba stadio aperas speciala «aktivo», aktiva kazo (kazo de aganto). Ĉie, kie ekzistas deklinacio ĝenerale, ekzistas ĉiam antitezo laŭ unu el du tipoj: aŭ — la nominativo kontraŭ la akuzativo, aŭ —

la akuzativo, aŭ — la aktivo kontraŭ la nominativo. Alivorte ĉie ekzistas la antitezo de la gramatika objekto kontraŭ la gramatika subjekto. En multaj lingvoj tiuj ĉi kazoj povas koincidi kun la aliaj. Tiel en la angla kaj franca lingvoj la akuzativo en ĉiuj okazoj krom la pronomoj koincidis kun la nominativo, en la lingvo laka (en Dagestano) la aktivo koincidis kun la posesivo (genitivo), en la georgia lingvo en pronomoj la aktivo koincidis kun la nominativo. Sed tiuj ĉi koincidoj ne ŝanĝas fundamente la fenomenon. En ĝenerala sistemo de lingvaj paradigmoj la menciita antitezo restas.

En amorfaj lingvoj la objekto same estas antiteziigita kontraŭ la subjekto, kaj por tio jam ĉie specialiĝis helpaj vortoj. En la amorfa ĉina lingvo la vorto *ba* kun signifo de *preni* plimalfortigis sian signifon ĝis neklara ĝenerala koncepto de la *agado* je objekto, tiamaniere la sekvanta post ĝi vorto estas komprenata kiel objekto. Ĉe la ekzisto de tiu fenomeno en la gepatra lingvo por ĉiniano neniel estos malfacile kompreni la signifon de esperanta *n*, kiu same esprimas la *agadon* je objekto ĝenerale. Tial se ni volas difini tiurilate la ĝeneralon, kio ekzistas ĉie en la lingva mondo, ni devas diri: en la internacia lingvo la antitezo de objekto kontraŭ subjekto estas necesa. Kaj pro tio, ke ĝenerale oni devis krei internacian lingvon, (celante la simplecon de ellernado) kun sistemo de afiksoj de universala signifo, — oni ne povis tiun ĉi gravegan antitezon (subjekto — objekto) esprimi per la leĝo de vortpozicio, nur por kontentigi individualismajn eltrovantojn, kiuj sin orientas ĉiu al sia propra nacia lingvo.

Estas ne tiom grava, sed tamen estas mencienda la proksimeco, kiu ekzistas en esperanto inter adjektivo kaj adverbo. En multaj lingvoj la adverbo estas tre malmulte diferencigita de la adjektivo. La praktiko de esperanta parolo, precipe konversacia, montras multajn esprimmanierojn, en kiuj la adverbo funkcias kiel gramatika agan-

to (ekzemple: e s t a s v a r m e). Zamenhof en tiu punkto agis certe senkonscie, li imitis rusajn «senpersonecajn» esprimojn. Sed la graveco de rolo de adverbo koincidas kun la fakto, ke en multaj lingvoj oni povas vidi la antaŭecon de ne-klare difinita signife adverbo antaŭ pli klare difinitaj adjektivo kaj eĉ substantivo. Oni vidas tion precipe en la preskaŭ-ĉieca en aglutinaj lingvoj riĉeco de verbaj adverboj (gerundioj), kiuj tre ofte formas la bazon de la tuta konjugacio.

Kompreneble, oni farus la plej grandan malsaĝecon, se oni enkondukas en internacian lingvon la seksan diferencigon (eĉ se nur por pronomoj) pli, ol tion faris esperanto. La forma gramatika genro tute forestas en plejmulto da lingvoj de mondo, kaj ĉiuj penoj de modernaj eltrovantoj enkonduki en la lingvon pedantan skrupulemecon je seksa rilato — estas pleje reakciaj eĉ pro tio, ke socie la seksaj diferencoj komencas ludi nuntempe vere signifan rolon.

Ne priparolante multajn aliajn gramatikajn fenomenojn de esperanto, ni diru, ke eĉ tio, kio de la hieraŭa kaj hodiaŭa vidpunkto eble tute prave povas esti nomata malbonaĵo de ĝia lingva sistemo, — morgaŭ sendube estos pravigita per la vivo mem. Ni parolas pri la supersignitaj literoj. Se Zamenhof laborus kaj kreus ne en Polio, li certe ektimus kaj ne enkondukus tiujn literojn. En kelkaj landoj (Anglio, Rusio) la presejoj, kvazaŭ fajron, timas ĉiun supersignitan literon, sed en Polio oni alkutimiĝis al ili. La ĉefa malbonaĵo de tiuj literoj estas ne tio, ke ili estas ekster la normala latina alfabeto. La presejo kaj liter-fandejo volonte aldonos tiujn literojn al unu aŭ du siaj litertipoj. Tamen ĝi neniel aldonos ilin al ĉiuj siaj litertipoj. Pro tio esperanto troviĝas en malgaja situacio de senpatrina infano. En la nacia lingvo la presejo donas siajn produktaĵojn en la tuta brilo de sia litertipa riĉeco, sed por esperanto ĉi tiu riĉeco limiĝas ofte nur je du-tri litertipoj. Tiu ĉi situacio premis la esperantistojn hieraŭ

kaj premas ankoraŭ hodiaŭ, sed la principo de la neceso de una speciala litero por ĉiu sono — estas nerefutebla. La sistemo de kombinitaj literoj estas speciale «okcident-eŭropa» skriba kutimo. La ekstereŭropaj skribaj sistemoj havas multajn teknikajn difektojn, sed ili ne havas kombinitajn literojn. La transiro de tiuj sistemoj al latina alfabeto estas ebla nur kun kondiĉo de la rifuzo de kombinitaj literoj — tion klare montris la historio de la latinigo de orientaj alfabetoj en Sovetio. Esperanto prave forĵetis kombinitajn literojn. Malgraŭ preterpasantaj malbonaĵoj en la komenco de sia vojo, ĝi firme konservas la principon, kiu garantias por ĝi plenan venkon en estonto. La vivo postulos, la litertipoj aperos.

---

La serio de preparolitaĵoj pruvas, ke la gramatika sistemo de esperanto ĝenerale estas konstruita tiel, ke la vojo de transiro al ĝi estas same mallonga de la lingvoj de ĉiuj tri nun ekzistantaj en la mondo lingvaj stadiaj tipoj, kiuj (kiel ni memoras) nenie estas puraj k nemiksitaĵoj. Estas abunde elprovita per praktikado la taŭgeco k facileco de esperanto por ĉiuj eŭropaj nacioj. Antaŭnelonge la sukcesoj de esperanto en Japanio k Ĉinio plifirmigis nian tezon pri tio, ke en esperanto ne estas io gramatike ne-taŭga k nealprenebla por japanoj kaj ĉinoj. Retrospektive rigardante la gramatikajn fenomenojn de la tuta lingva mondo — kion ni penis tie ĉi mallonge kaj skeme fari — ni vidas, ke ĉio grava, ĉio gramatike necesa en modernaj kondiĉoj, respreguliĝis en la sistemo de esperanto en la formoj de pleĵa simpleco. Tiusence la artefarita lingvo esperanto povas esti nomita ne nur helpa internacia sed ankaŭ helpa monda interkontinenta lingvo.

---

## PRI LA LIBERO DE NEOLOGISMOJ EN ESPERANTO

Ni ne estas reformemaj rilate al la lingvo. Ni tute ne intencas preferi idon, cccidental aŭ novial, pro iliaj laŭŝajnaj, laŭformaj perfektaĵoj, — kaj komenci anstataŭ esperanto praktikadon de iu el la «pli perfektaj» lingvosistemoj. De tiu vidpunkto pravas idistoj, nomante nin — «lingvaj ortodoksuloj».

Ni ne estas ankaŭ konservativuloj, fundamentistoj rilate al la lingvo. Ni tute ne intencas limigi nian lingvuzadon nur per formoj, troviĝantaj en la Oficiala fundamenta vortaro kaj en ĝiaj aldonoj. Konforme al niaj bezonoj kaj al la eventualaj ebloj ni tute libere iras ekster la limoj de la Fundamento. Ni tute konseie pretas esti pliperfektigistoj de la lingvo, ni pretas senhezite ĝin akomodi al ĉiuj sentataj bezonoj kaj necesoj. De tiu vidpunkto pravas la vere-ortodoksaj fundamentistoj, kies ordinara bezonoj estas kontentigeblaj per la enhavo de la Fundamento, nomante nin «lingvaj reformemuloj».

Por ni la lingvo internacia estas certa kondiĉa ilo por internacia interkompreniĝo. La kondiĉoj kaj formoj de tiu interkompreniĝo estas difinataj de certaj sociaj bezonoj. Neniu Fundamento povas rezisti kaj kontraŭstari al tiuj bezonoj. Laŭ tiu vidpunkto oni nomu nin «reformemuloj».

Sed la lingvo — socia instrumento — ne povas esti individue reformata kaj ŝanĝata. La ŝanĝojn al ĝi trudas la vivo kaj la sociaj bezonoj. Elimini sin kaj la lingvon de tiuj bezonoj povas nur homoj, kiuj kulturas iun apartan sekton kaj menson, izolitan de la alia mondo. Ĉar ni ne volas nin elimini de la socio — laŭ tiu vidpunkto — oni nomu nin «ortodok-

suloj». Batali por individualistaj pliperfektigaĵoj de ido, occidental kaj aliaj ni ne volas kaj ne povas.

La lingvo internacia, kiun ni uzas, devas konformi al niaj bezonoj sociaj, sed samtempe ni povas uzi nur tiujn formojn de la lingvo, pri kiuj ni estas certaj, ke ili estos bone komprenataj de la aliaj lingvo-uzantoj, kun kiuj ni interrilatas.

Ni ne limigas nian lingvo-uzadon per la Fundamento. Ni konsideras la lingvon, same kiel la socion, evoluanta. Sed tiu evoluo obeas al certaj socialaj premisoj kaj leĝoj. Arbitraj individuaj provoj kaj iniciatoj ne povas garantii la ĝustecon de la aldonoj, ŝanĝoj kaj korektoj, eventuale por la lingvo proponataj. Simila arbitra individua iniciato estas certgrade eĉ kontraŭsocia ago, ĉar ĝi repuŝas la lingvon, jam uzatan kaj praktikatan, al pli malalta ŝtupo, kiam la novaj formoj uzataj ne estas tuje kompreneblaj, sed kiam ilia signifo devas esti divenata, kun aldona risko, ke la diveno estos ne la ĝusta.

Tiuj konsideroj devas esti pleje de ni atentataj. Kaj atentante ilin—nian bezonon por socie necesaj esprimoj kaj la bezonon esti komprenataj de la personoj, konantaj esperanton—ni povos ĉiam plej facile solvi la problemon, ĉu la lingvo-formo, kiun ni intencas uzi estas celkonforma kaj taŭga.

Esperanto estas ne nura projekto, ĝi estas vivanta socia, kolektive per praktiko evoluigata, lingvo.

Esperanto estas ne nur intereŭropana lingvo, ĝi estas lingvo interkontinenta. Esperanto estas ne nur lingvo de la klerularo, por kiu ĝi anstataŭas la internacian latinan lingvon; ĝi estas la lingvo de vastamasa demokratio. Per tiuj tri ecoj esperanto konsiderinde diferenciĝas de aliaj internacilingvaj projektoj. Kaj tiuj tri ecoj, kiujn ni ne pre devas konservi, antaŭdifinas, ke ĉiujn arbitre, individue elpensatajn lingvo-formojn ni devas en vasta antaŭpublika

aplikado de la lingvo laŭpove anstataŭi per formoj, kiuj estas konataj al la esperantistaro — ĉu laŭ la ĉiutaga uzo de la lingvo, ĉu laŭ la tradiciaforma kunmetado de novaj kunmetitaj vortoj el la fundamentaj elementoj de Esperanto.

Siatempe, dum la jaroj 1910—1914, H. Sentis eldonis gazeton «Esperanta evoluo», en kiu li porbatalis plurajn reformajn proponojn kaj inter tiuj la enkondukon de prepozicioj: *de, di, da*. Li ne sukcesis en siaj individuaj proponoj, kaj Esperanto perfekte progresis, eĉ ne akceptinte tiujn proponojn.

Dum la jaroj 1924—1927 en Hamburgo la redaktanto de la gazeto «Unuigita Tuthomaro» provis trudi uzadon de formoj: oficiala, appellacii, terro, kongresso, proviso (provizo), devisio (devizo), exemplo ktp. Ankaŭ li malsukcesis, kaj en la jaro 1930, kuracigita de sia individualisma arbitremo, la redaktanto de tiu gazeto ĝin reaperigis en tute deca, sen iuj specialaj artifikaĵoj, esperanto.

Ni ne parolu jam pri aliaj individualistoj malsukeesintaj el la sama speco: Huertas (1890), Grabowski (1893), Berthelot (1904), Ŝmurlo (1917).

Similajn tendencojn ni renkontas ankaŭ inter la sovetiaj esperantistoj. Unu k-do persiste skribas al ni: telegrafio, telefonio kaj... «poŝtio», kvankam la lasta formo apartenas ĝuste al tiuj, kies senco kelkfoje povas esti divenata, sed ne — laŭ la konataj lingvo-elementoj — komprenata. Ĥarkovaj kamaradoj persistas en uzado de kontre (kontraŭ), preske (preskaŭ), marxismo, redaktio (redakcio, redak-tejo). Ofte kun speciala memkontento kaj eĉ sinadmiro estas uzataj iuj novaj okcident-eŭropaj vorto-formoj, kiuj povus esti tute bone anstataŭigitaj per formoj jam bone kutimaj al la esperantistaro. Sendube, estas premisoj, por ke ni atendu pluan kreskon de tiaj tendencoj inter la sovetianoj, kiuj pro multaj kaŭzoj nun komencas pioniran laboron en prilaboro kaj disvolvado de diversaj fakoj de la lingva terminologio kaj de la lingva uzo. Do necesas, ke ni despli

atente observu la individualistajn arbitremajn tendencojn, kiuj povas montriĝi en la esperanta praktikado.

Ĉar ni ne estas iuj fanatikaj fundamentistoj, ni vidas nenion danĝeran en uzado de formoj — anke, kontre, preske... — kondiĉe ke tiuj formoj estu uzataj ĉe rilatoj kaj en verkoj destinitaj por spertaj esperantistoj. La lingvaj spertuloj bone komprenos, kion celas esprimi per tiaj formoj ilia uzanto. Tiurilate ni agas same, kiel kun la formo *k* (kaj), kiu estas ĉiam pli ofte praktikata por skriba kaj presa uzo. La spertuloj komprenas, kion signifas la litero *k* kaj tio sufiĉas. Tamen ni neniam kaj nenie riskos rekomendi aŭ dume eĉ allasi la uzon de similaj formoj en la lerno-libroj kaj en la verkoj destinitaj por novaj, ankoraŭ ne sufiĉe spertaj esperantistoj. Tiuj formoj povus nur fuŝi ilian lingvokomprenon kaj uzadon.

Iom pli alie staras la afero kun arbitraj «ŝajne-derivitaj» — poŝtio kaj similaj vortoformoj. Ili estas enigmoj, postulantaj divenon, ankaŭ de spertaj esperantistoj. Same senbezone ni ne uzu iujn novajn formojn, eĉ ŝajne eŭrope-internaciajn, se anstataŭ ili ni posedas jam iun esperante-praktikatan vorto-formon. Ni memoru ke eĉ por spertaj esperantistoj de Oriento ĉiu nova eŭrope-internacia radiko estas tamen ĝena kaj postulas aldonan studon. Tial estos tute nature, se en rilatoj kun Oriento anstataŭ «bremso» ni uzos «vagonarhaltigilo».

Certe, la lingvo pro tiaj arbitre-derivitaj, uzataj formoj ne pereos kaj ne dialektiĝos, sed tiuj formoj, ĝenantaj internacian komprenon de esperanto, ĝenas ĝian socialan utiligon por nuntempo.

En niaj rilatoj kun la Okcidenta Eŭropo ni povas uzi same bone la derivitajn esperanto-formojn (redaktejo) kaj la formojn internaciajn (redakcio). En la rilatoj kun Oriento estu ĉiam preferataj la formoj de la unua speco. Ĉar per niaj verkoj kaj presaĵoj publikaj ni same devas celi okcidenton kaj orienton, — do tiuj formoj de la unua speco eĉ iam rajtas esti preferataj en presaĵoj.



Same kiel por eŭropanoj, tiel ankaŭ por orientanoj formo simila al «redaktio» estas ne komprenebla kaj nur divenebla. Tial la kamaradoj lasu siajn similajn tute ne necesajn, por la lingvo neprogresigajn kaj socie eĉ malutilajn eksperimentojn kun simila vorto-derivado.

Ankaŭ tju rekomendo devas montri, ke, ne estante konservativuloj fundamentistoj, ni en same malgranda grado volas esti la individualisme-anarkistemaj «revoluciuloj», por kiuj ne gravas la sociaj kvalitoj de la lingvo, sed gravas la personaj preferindaĵoj.

## LA NUNA ESPERANTO, LA ESTONTA LINGVO INTERNACIA KAJ LA LINGVO TUTMONDA

La lingvo estas nepra akcesoraĵo de homa socio. La evoluo de la homa socio okazas sur bazo de evoluo de certa produktadtekniko. La pasinta kaj eĉ la nuna stato de tiu evoluo tre diferencas ĉe diversaj landoj kaj popoloj. Tial sociologie estas klarigebla la daŭranta ankoraŭ ekzisto de apartaj popoloj kun apartaj kulturoj kaj lingvoj.

La specialaj ecoj de la kapitalisma ekonomisistemo ne donas iun esperon, ke ĉe la kapitalismo povus okazi iu ĝenerala unueciĝo de la mondekonomio, de la produktadmetodoj kaj produktad-tekniko en la mondo. La kapitalismo neeviteble postulas daŭran ekziston de la landoj, teknike pli alte progresintaj kaj de la landoj koloniaj aŭ duonkoloniaj kun pli malalta produktadtekniko kaj kun pli intensa homekspluatado.

Tial ni asertas, ke unueciĝo de la mondekonomio povas okazi tutmonde nur post renverso de la kapitalismo kaj post starigo en tutmondo de nova kolektivisma sociordo. Do ankoraŭ nur en epoko kolektivisma povos malaperi la lingvoj kaj kulturoj naciaj kaj stariĝi iuj universalaj komunhomaj kulturo kaj lingvo.

Tial pretendi, ke jam nun esperanto en siaj nunaj formoj estas la estonta universala lingvo — estas nek saĝe, nek konforme al la sociologio.

Lingvo evoluas sur bazo de evoluo de la ĝenerala kulturo kaj tekniko. Antaŭvidi senerare ĉiujn estontajn plievoluintajn formojn de la kulturo kaj tekniko ne eblas same, kiel

ne eblas senerare antaŭkonjekti ĉiujn formojn de la lingvo uzota dum la estonto.

Do akceptinte la tezon, ke la nuna esperanto ne estas la ĉutmonda universala lingvo, ni nun provu trovi por ĝi ĝustan titolon por la nuna epoko.

Por tion fari necesas antaŭe klare fiksi nian sintenon al la nun ekzistantaj naciaj lingvoj kaj al ilia plua disvolvo.

La nuntempaj nacia kulturo kaj nacia lingvo en la grado de sia pleja disvolviĝo estas esence klaskulturo kaj klaslingvo de la nacieca burĝaro. Tamen la proletaro, batalanta por starigo de sia klaspotenco kaj por starigo de sia kulturo, ne kreas novan kulturon kaj novan lingvon el nenio, sed transprenas kaj modifas konforme al siaj bezonoj la plej altajn atingajojn de la burĝa kulturo.

Jam nun en la periodo de degenero de la kapitalismo ni observas, ke apud la burĝaj kulturo kaj lingvo komencas rapide kreski kaj disvolviĝi elementoj de la kulturo kaj lingvo proleta. Tiuj novaj lingvoj, kreskiĝitaj sur la bazo de la kulturoj kaj lingvoj burĝaj posedas laŭfotmajn (eksterajn) naciajn diferencojn proprajn al la diversnaciaj burĝaj kulturoj kaj lingvoj. Sed laŭesence ili jam estas internaciaj-proletaj. Vere en la proleta literaturo diverslingva oni trovas multe pli da komuneco kaj parenceco ol en la verkoj de diversnaciaj burĝaj verkistoj — malgraŭ la fakto, ke ankaŭ ili apartenas al la sama klaso.

Kaj ĝuste tiu unuecigo de la ideologia esenco-enhavo de la lingvoj ĉe la proleta diktaturperiodo kaj ĉe la socialismo estas tio, kio montras, ke venos la tempo kiam ne nur laŭenhavo, sed ankaŭ laŭforme la lingvoj unueciĝos.

Tia evoluvojo — kiam proletaro heredas, utiligas kaj aliformigas komence laŭesence, laŭenhavo poste ankaŭ laŭforme la lingvojn de la burĝa kapitalisma periodo estas tute natura kaj logike necesa. Nur sekvante tiun vojon oni povas tiri al vasta konstrulaboro por starigo de nova sociordo vastajn popolamasojn, kies sola lingvo restas kaj ankoraŭ longe restos nur ilia lingvo gepatra.

De tiu vidpunkto necesas fari konkludon, ke ni nepre ne rajtas esti malamikaj al la plua disvolvo kaj kreskado de la lingvoj naciaj, ke tia disvolvo kaj kresko, celanta doni al la lingvoj kaj kulturoj esence unuecan, internacian, socialisman enhavon, estas afero progresiga kaj necesa, por plua disvolvo de la homaro al kultura kaj lingva unueco, efektiviĝonta dum plua disvolvo de la homa socio.

Sed ĉu akceptinte tiun tezon ni konservas ankoraŭ iun lokon por esperanto? Se la lingvoj naciaj devas esti ankoraŭ flegataj kaj kreskigataj, transformataj, ĉu la apero de internacia komunikilo—esperanto ne estis trofrutempa? Ĉu entute ĝi necesos por plua kultura kaj lingva progresigo de la homaro?

Jes, esperanto estas nepre necesa faktoro por plua evoluo de la homaro! Jes, esperanto jam nun estas necesa kaj konsiderinda faktoro. Fakte ja ni vidas, ke dum la «unuecigo laŭenhava» de la lingvoj multe progresigas ilian unuecigon laŭforman. Tia laŭforma unuecigo estas multoble ĝenata per la ekzistanta lingva tradicio, diversaj lingvaj reguloj, malsamaj transskribsistemoj ktp.

Krome necesas plifaciligo de internaciaj rilatoj. Tiu neceso kreis esperanton kaj donis al ĝi bazon por plua evoluo. Se ni konsideras esperanton, kiel jam ekzistantan fakton (kaj kiel fakton ĝin neniu povas ne i), — ni konstatas, ke la nuna epoko de poima aliĝo de la lingva kaj kultura enhavo, kies hegemono fariĝas anstataŭ la burĝaro — la proletaro, — aldone estas karakterizata per ekĝermo kaj ekkresko de tute nova internacia interkomunikilo en formo de la lingvo inter-

nacia. Laŭenhave tiu lingvo, uzata por internaciaj rilatoj, povas nur respuguli tiun nivelon, kiun atingis la lingvoj naciaj. Lingvoj naciaj restas ĝis nun la ĉefa lingvo-produkto bazita sur la jam atingita nivelo de produktadtekniko kaj de ĝenerala kulturo... La lingvo internacia laŭenhave ankoraŭ nenion povas aldoni al tiuj esencaj internaj valoroj, enhavataj en la naciaj lingvoj. Sed dank'al sia universaleco, fleksebleco, facileco kaj reguleco la lingvo internacia, kvazaŭ ensorbis la tutan esencon, ĉion valoran el la lingvoj naciaj. Ĉiuokaze la lingvo internacia entenas en si laŭforme ĉion por povi plengrade anstataŭi iun ajn el la lingvoj naciaj.

Neniu el la naciaj lingvoj kapablas plene anstataŭi iun alian nacian lingvon. Tro diferencaj estas la kondiĉoj de iliaj evoluoj kaj iliaj uzomedioj.

Esperanto laŭ sia formo, malligita per iuj tradicioj, sendiskute povas anstataŭi ĉiun el ili, kaj tiu eco de esperanto permesas al ni skizi ĝian eventualan rolon ĉe starigo de unulingva homaro en la estonteco.

Ne gravas, ke en la nuna periodo esperanto verdire eĉ ne estas la ĝenerale akceptita lingvo internacia, ke en sia nuna formo esperanto estas nur kondiĉa tre facila kaj tre bone uzebla helpa internacia interkomunikilo por tiuj, kiuj volas tiun interkomunikilon utiligi.

La fakto, ke esperanto estas uzata de diversnaciaj multmilaj amasoj, ke ĝi evoluas en la tuta mondo, ke ĝi enhavas jam elementojn, necesajn por ĉiuj fakoj de homa vivo kaj laborado, — tiuj faktoj permesas aserti, ke ĝuste esperanto, pluen evoluante, en certa grado helpos formigi tiun bazon, sur kiu elkreskos la estonta ĝenerale akceptota internacia lingvo.

Ankaŭ la lingvo-enhavo-evoluon de la kapitalismo al la socialismo ni observas ne nur en naciaj lingvoj, sed same

en esperanto. En esperanto, lingvo uzata speciale de plej progresemaj soci-tavoloj, — tiuj tendencoj al ekposedo de supernacia socialisma enhavo estas eĉ pli klaraj, pli okulfrapantaj, ol en la lingvoj naciaj.

Ni jam konstatis, ke la konservigaj, tradicie bazitaj faktoroj elmontras tendencon ĝeni laŭforman unuecigon de la naciaj lingvoj, eĉ post kiam ili estos estrataj de proletaro kaj post kiam ili ĉiuj iĝos esence proletaj, socialismaj.

Do antaŭ ni montriĝas neceso de certa lingva revolucio por levi la lingvo-evoluon al plua ŝtupo; kaj tiu revolucio estos efektivigita per vojo skizita de la kolektiva kreado de la nuna esperanto.

Plua kresko kaj fortikiĝo de la internaciismaj, socialismaj elementoj en la lingvoj naciaj estos antaŭirata de plua internaciigo de la tutmonda ekonomio kaj de la produktadmetodoj.

Do konstante daŭros kresko de la bezono de la lingvo internacia. Tiun rolon la lingvoj naciaj — pro kaŭzoj al ili propraj — plenumi ne povos. Tiun rolon ili ne povas plenumi eĉ en la socialisma socio, kiam efikos la postulo pri absoluta egalrajteco de la lingvoj. Do konstante — kaj speciale en la periodo, — kiam plene internaciigos la mond-ekonomio kaj kiam la proletaro ekposedos la potenceon, — la nombro de esperantistoj daŭros kreski. Konstante pliriĉigante kaj ensorbante ĉiujn valorajn elementojn de la pluen evoluintaj lingvoj naciaj, la lingvo esperanto fariĝos tiamaniere iom post iom, ĉiam en pli alta grado, la internacia lingvo de la homaro. En la epoko socialisma la kreskanta bezono de la lingvo por tutmondaj rilatoj, kaj iom post ioma forigo de bezono uzi lingvo kun limigita ununacia apliko kaŭzos, ke certatage efektiviĝos la lingva revolucio, jam delonge antaŭpreparita.

La lingvo internacia tiutempa, kreskinta ella kerno de la nuna esperanto, sur ĝia bazo disvolviĝinta, tiu lin-

gvo — multoble pli vaste uzata ol la nuna esperanto forpuŝos uzadon de la naciaj lingvoj ankaŭ en internaciaj rilatoj.

Tiam la lingvo internacia helpa fariĝos en siaj novaj formoj la lingvo universala tutmonda. Nek unu nacia lingvo — pro elementoj de nacia limigiteco tiun rolon povos plenumi. Nur lingvo internacia, kreskinta el la kerno de la nuna esperanto, posedanta samgradan kaj eĉ pli altan ol la nuna esperanto universalecon kaj flekseblecon de siaj konstruprincipoj — povos plenumi tiun taskon.

Plej bonajn pruvojn tiurilate donas al ni la observataj de ni faktoj de konstanta pliriĉiĝo de la lingvo internacia, konformiĝanta al ĉiuj bezonoj de pluen evoluanta homa kulturo kaj tekniko. Do resume — esperanto helpas al firmigo de tiu bazo, kiu eĉ plua sia evoluo, laŭ vojoj montritaj, servos por konstruo kaj ĝenerala akcepto de internacia lingvo — komence helpa, ekzistanta apud la lingvoj naciaj, kaj poste universala, tutsola.

Eĉ la argumentoj kaj supozoj kelkfoje esprimitaj, ke eĉ plua disvolvo de la socio la lingvoj sukcesos superi siajn naci-konservigajn elementojn kaj rezulte internaciigi ankaŭ laŭforme — ne povas nuligi la rolon de esperanto. Ĝi daŭros servi kiel ilo por internaciaj rilatoj. Ĝi daŭros adaptiĝi al pluen internaciigontaj formoj de la naciaj lingvoj, tiujn formojn ensorbi. Ĝi nepre restos la plej internacia, plej ampleksanta, plej neŭtrala. Tial la pluen evoluanta internacia lingvo pli ol iu nacia lingvo, kiom ajn perfekta ĝi estu, — havos plejan ŝancon por fariĝi kerno de la universala internacia kaj poste unusola lingvo de la homaro.

Kompare kun la ardaĵ esperantismoj ni traktas la rolon de esperanto por la nunaj tagoj sendube tre modeste. Ni konsideras esperanton en ĝia nuna formo tute ne kiel estontan lingvon universalan, kiu ekstermos la lingvojn naciajn. Ni ne pensas, ke jam en nuna momento la dis-

volviganta lingvo internacia rajtus kaj kapablus anstataŭi la lingvojn naciajn. Ni ne intencas konsideri la nunan esperanton kiel plej perfektan lingvon. Ni volonte lasas al esperanto modestan servan rolon de helpa lingvo por internaciaj rilatoj.

Tia malvarmsanga traktado de la problemo estas al ni propra. Ĉe tia traktado oni ne rajtas nomi nin fanatikuloj kaj Don-Kiĥotoj. Ni scias realon kaj konsideras la aferojn reale.

Kaj tamen ni scias, ke nia lingvo pluen kreskos, pluen evoluos kaj fine el ĝia baza kerno formiĝos la plej perfekta, la unusola lingvo de la socialisma epoko.

Tiu scio, ke ni laboras por estonto, ke nia lingvo estas grave necesa socia faro, — tiu scio nin levas super fantastaj utopiistoj kaj tiu scio anstataŭas por ni la naivan revadon de la unuaj utopiismanoj de la mondlingvo kaj de la esperantismanoj de la komenca periodo de esperanto.



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



## PRI UNU AKTUALA TEMO

Vice kun la alterudiciaj verkoj de niaj proletaj esperantologoj, kiuj kreas por esperanto novan epokon, ĉiu el ni rimarkas en la movado, strangan, nepardoneblan mizeron, kiu kontrastas antaŭ la teoriaj atingoj, kiel kabaĉo antaŭ la novjorka ĉielskrapulo.

Se iu laboristo estas entirata en niajn spalirojn, se li plej okulvideble sentas la facilecon de esperanto kaj ĝian taŭgecon por la internaciaj rilatoj kaj se li volas reale ekprovi la lingvon por sia internacia — privata aŭ kolektiva — korespondado kun la eksterlandaj kamaradoj — ofte li trafas en embarasan situacion: li ne povas nomi sian profesion en esperanto, nek sian maŝinon, ĉe kiu li laboras ĉiutage, nek la produkton, kiun faras tiu maŝino.

Vane li serĉas en diversaj aĉetitaj esperantaj vortaroj iun konvenan vorton — kun amara sento li ofte (ho, tre ofte!) konstatas, ke nek la vortaroj, nek eĉ pli spertaj kamaradoj povas al li helpi.

Tiu neŭtralisma rilato al la lingvo, kiu metis multajn laborulojn en tiom strangan situacion de elpelito, estas ilustrata per tiu ĉi ekzemplo plej klare kaj neniuj sinpravigoj pri la juneco de la lingvo, pri la entreprenataj laboroj porparolus la defendantojn de ĉi reakcia malrapidado.

La laboristo ne rezonas kiel profesia lingvisto, sed ofte lia rezonado malfermas la okulojn al la dua. Prave multaj laboristoj povas riproĉi la lingvon, aŭ pli vere ĝiajn gvidantajn aŭtoritatojn, ke post pli ol kvardek aktivaj jaroj de sia ekzistado la lingvo ĝis nun postrestas mul-

tajn malgrandajn naciajn lingvojn, kiuj progresas pli rapide kaj pli konforme al la vivo. Ne malpli riproĉinda estas ankaŭ la pli ol dekjara movado esperanto-proleta, kiu krime flankiĝis de unu el siaj plej devaj taskoj.

Kiel ajn — la lingvo malgraŭ sia facileco kaj taŭgeco ĝis nun ne maturiĝis por ĉiuj bezonoj de laboristo. Des pli por la bezonoj de laboristo, kiu, kiel en USSR, fariĝas mastro kaj majstro de sia altkvalifika laboro.

La leksikono de esperanto estis ĉiam ĝia plej malforta flanko kaj la akila kalkanumo de ĝia evoluo. Se en la oficiala vortaro troviĝas tiuj monstroj por laboristo, kiel: *metempsikozo* aŭ *kongregacio*, sed ne troviĝas konvena vorto por esprimi unu el la plej antikvaj iloj de l'homaro, la emblemon de unu el la plej modelaj novaj ŝtatoj<sup>1</sup>, — neniu povas diri, ke niaj kulpigoj estas partieceaj aŭ inteneaj.

Cetere ili estas nur kaŭzigitaj per la vortoj de konata aŭtoro de «Historio de esperanto», E. Privat, kiu, donante en la junia numero de «Esperanto» (1931) nekrologon pri T. Cart, montras al ĉiuj ni klare, kie troviĝas la kaŭzo de tiu mizero en la teknikaj terminoj kaj vortaroj. Karakterizante la mortintan prezidanton de la Akademio, E. Privat, interalie diras: «Sub lia (de T. Cart) gvidado, la Akademio sin tenis en negativa polemika rolo kaj ne daŭrigis la pozitivan organizadon de teknika laboro kaj esploro, iniciatita de rektoro Boirac». Kaj poste: «Ni esperas ke la Lingva Komitato reprenos sian taskon sub direktado de profesia lingvisto, kiel ekzemple profesoro Collinson. Niaj teknikaj vortaroj bezonas urĝan prizorgon».

<sup>1</sup> Por esprimi tiun ilon oni uzas vorton rikoltilo, tute malsufiĉan por esprimi la veran ideon. Oni ja uzas plumo, kraĵono, peniko, sed ne uzas nur skribilo. Rikoltilo povas esti ĉiu instrumento por rikoltado de: grano, fojno, fruktoj eĉ de... kuponoj, kiujn la kapitalistaj rentuloj rikoltas ĉiujare. Tial lastatempe oni proponis: serpo.

La laboristoj ne povas senzorge preteriri tiun kulpigon. Male ili faros difinitan organiz-dedukton kaj en sia marŝado antaŭen ankaŭ en la esperanto-aferoj preferos elekti pli racian kaj pli efikan vojon por la forigo de mankoj, kiuj en tiu esperanto-movado ekzistas.

Ni scias ke ĉe la Esperanta akademio ekzistas speciala sekcio por la sciencaj kaj teknikaj vortaroj. Ĝin gvidas, malnova kaj sperta esperantisto Rollet de l'Isle. La Sekcio posedas en manuskriptoj kelkajn teknikajn vortarojn. Pro diversaj kaŭzoj tiuj manuskriptoj ĝis nun ne estis kaj ne estas publikigataj.

Kiam la Lingva Komisiono de SEU ekrilatis kun la Sekcio por scienc-teknikaj vortaroj, venis la respondo, ke la Sekcio volonte helpos per siaj konsiloj al la entreprenataj en USSR laboroj pri teknikaj vortaroj.

Montriĝis, ankaŭ ke la plejparto de la teknikvortaraj manuskriptoj, kiujn posedas SSTV, estas ne plena j, diversmaniere ellaboritaj, kaj iliaj aŭtoroj posedas ilin nur en unu sola ekzemplero. Personaj intertraktoj kun ties aŭtoroj kondukis al impresoj, ke la ĉefa laboro troviĝas tamen ekstere, kio jam estas farita.

Neniel neante la gravecon de tiu laboro, kiun faris apartaj volontuloj de la esperantaj teknikaj scioj, ni devas diri, ke tiu laboro ne ĉiam iras kaj celas la saman vojon, per kiu venas nun la teknika problemoj en USSR.

La vortaroj de SSTV celis plejparte aŭ malvastajn fakulojn, aŭ pritraktis nur iujn malvastajn fakojn de la konkerna metio aŭ industrio.

Tiel ekzemple el la spin-teksa industrio estis ĝis nun iomete prilaborita nur la *a p r e t a* fako, kio certe estas nur parta solvo de la granda faka vortaro.

Ni bone scias ke eĉ la ekzisto de tiuj vortaroj, kies manuskriptojn dume posedas SSTV, multe helpas al tiu ŝturma devizo, kiun proklamis la sovetiaj esperantistoj «Esperanton en la servon al la teknika kvalifikiĝo de la laborulaj amasoj!», sed kiel konstatis la Lingva Komisiono

de SEU, en ties grava rezolucio, presata samlibre, la sovetiaj esperantistoj ne estas certaj ke la organoj de la Esperanta Akademio posedas sufiĉe konvenan aparaton por plenumi la aferon tiel kaj tiam, kiel kaj kiam la vivo kaj la socialisma konstruado diktas ĝian plenumon en USSR.

Ni rajtas timi ke tiuj vortaroj pro la dumaj valutaj cirkonstancoj ne povos atingi la vastajn rondojn de niaj sovetiaj teknikaĵoj esperkoraj.

Ni pli ol rajtas konstati ke la baza konstruo de tiuj vortaroj tute ne celos la bazan konstruon de nia soveta tekniko.

Parolante la vortojn «sovetaj kamaradoj, soveta tekniko» ni ne konsideras nin ŝovinismaj. Sed la fakto ke USSR iom post iom fariĝas la vera centro de la prolet-lingva esperanta laboro, kaj tiu konfido, kiun montris la naciaj lingvo-komisionoj al Moskvo, elektinte ĝin sia koordina centro, rajtigas nin diri, ke ni ne eraros, espriminte la opinion de la revoluciaj esperantistoj, ke la afero de USSR estas samtempe afero de la monda revolucia proletaro kaj inverse. La afero de la centra teknika kaj ideologia gvido de la tutmondaĵaj proletaj esperantistoj nun centriĝas kaj estas dume plenumata plej intensive en Moskvo.

Ni ne devas kaŝi de la aliaj la tutan diapazonon de niaj celadoj: la ideologian kaj teknikan superiĝon super la aliklasaj esperantistoj.

Ni ŝatus apliki al kunmetado de niaj teknikaj vortaroj la principojn de la plej vasta internaciismo (ne nur de eŭropismo) kaj de vera klasa konstruo de la lingvo.

Antaŭ ĉio ni metas ne la sekan terminaron de nuraj scienculoj kaj teknikistoj (kvankam ni neniel celas malaltigi la nivelon de la teknikaj scienculoj ĝis nivelo de simpla laborista lingvo), sed la profesion lingvon de la laboruloj mem.

Se ni proklamas ke la nacioj devas kulturi socialismon per sia nacia lingvo, sur la transira ŝtupo al la estonta

tutmonda lingvo de la senklasa socio, des malpli ni devas ignori la efikon kaj bezonon de la propra profesia laborista lingvo kaj terminaro en la afero de la internacia teknika eduko.

Tiu profesia laborista lingvo, kiel ni scias, ĝis nun ĉiam forestis en niaj teknikaj vortaroj. La specifika sento de laboristo, kiu kunvivas la maŝinojn kaj produktilojn (speciale en la kondiĉoj de la socialisma konstruado en USSR) ne nur ne devas esti ignorata, sed kontraŭe prezentas per si forton, pri kiu la neŭtralaj esperanto-teknikuloj eĉ ne revis.

La nepra pridiskuto de ĉiuj uzataj kaj enkondukataj terminoj eĉ la fabrikaj ĉeloj kaj korespondejoj, ilia praktika antaŭapliko en teknikaj krestomatetoj, vasta kritiko de tiuj terminoj estas «conditio sine qua non» de nia esperanta teknika lingvo.

La trafemo kaj viva konstruo de la vivantaj, laboristaj, propraj terminoj ofte pli bone solvas la problemon ol la nuraj lingvistaj tezoj de scienculoj.

Eble la procedo mem de la kunmetado de terminaroj, tiuj, kiujn al si prezentas la eŭropanoj, plilongiĝos. Sed se ni antaŭe publikigos la terminarojn en periodaj organoj, kun vasta pridiskuto de la proponaĵoj, kiel faris tion la esperantaj medicinistoj, tio savos nin de la prokrasto kaj nesiatempa apero de la vortaroj. En tiujn lastajn eniros ĉio, kion pruvis necesa la eksperimentado, la pridiskutoj kaj la praktika uzo.

Kun la altiĝo de la homa tekniko ĉiam altiĝos ankaŭ la nivelo de la teknika lingvo, prezentante per si la unuan plej efikan ŝtupon al la vera internaciigo de la lingvoj.

Esperanta terminologio do ne devas esti konsiderata de ni sole de la utilitara teknika vidpunkto. Kontraŭe, ni devas pleje konsideri ĝian gravecon en la unuiga procedo de la estonta tutmonda lingvo.

Jen kial la sovetiaj esperantistoj pensas ĝin konstruita sur la plej vastaj principoj de vera internaciismo, sur bazo de la teknika profesia lingvo de la laborulaj amasoj kun apliko ankaŭ de la lingvo de altaj teknikaj sciencoj kaj en integra kontakto inter la teorio kaj praktiko — per la perioda kaj diskutata, laŭtempa aperigado de la plej necesaj terminaroj laŭ la aktuala urĝec-grado.

---

## PROVIZORA STATUTARO DE LA INTERNACIA SEK- RETARIARO DE LA LANDAJ PROLETAJ ESPERAN- TAJ LINGVO-KOMISIONOJ (ISLK)

Ĉar la rezolucio de la Lingva Komisiono de SEU, akceptitan ĉe la kunsido de 26/VI 1931 kaj esprimintan la neceson starigi lingvo-komisionojn ĉe la proletaj landaj esperanto-kungrupigoj, — akceptis kaj aprobis ĉiuj landaj proletaj esperanto-organizaĵoj, starantaj sur la klasbatala pozicio kaj ĉar la nomita rezolucio celis starigon de speciala internacia koordina centro por ĉiuj proletaj lingvo-komisionoj— tial tiu ĉi provizora statutaro komencas funkcii kune kun la samtempa starigo de la Internacia Sekretariaro de la landaj proletaj esperantaj lingvo-komisionoj kaj estas konsiderata kiel unua regularo, difinanta la interrilatojn de la lingvokomisionoj.

ISLK estas centro, kiu koordinas la laboron de la landaj, lingvo-komisionoj, akcelas starigon de la novaj kaj informas la starigitajn pri ĉiuj gravaj laboroj en la aliaj lingvo-komisionoj kaj en la centro.

Konstituigo de ISLK estas komisiata al unu el la landaj lingvo-komisionoj. Por la nuna tempo—konforme al propono de Germana lingvo-komisiono—tiu constituigo estas proponita al la Lingva Komisiono de SEU. Sidejo de ISLK estas Moskvo.

La Lingva Komisiono de SEU delegas al ISLK tri el siaj membroj por efektivigo de necesa organiza laboro, kun la rajto pligrandigi tiun nombron laŭnecese.

Ĉiu landa lingvo-komisiono delegas al ISLK po 1 kamarado (kun 1 rezerva anstataŭanto) por la necesa kunligo kaj koordinado de la laboroj.

Ĉiuj landaj lingvo-komisionoj restas absolute egalrajtaj, aŭtonomiaj unuoj, obeantaj nur la principojn de la ĝenerala prolet-revolucia, klasbatala disciplino kaj la kolektive akceptitajn decidojn.

Enlande la lingvo -komisionoj estas liberaj pri la kvantoj de siaj membroj kaj pri reguloj de sia funkciado.

Koordinataj estu la ĉefaj taskoj de la lingvo-komisionoj:

- a) materialism-dialektika traktado de la lingvo;
- b) apliko de marksism-leninisma ideologio en ĉiuj novekondukataj aŭ reformataj vortoj aŭ formoj;
- c) vastamasa kritiko kaj elprovado por ĉiuj novismoj kaj proponoj;
- ĉ) klarceco kaj simpleco de la lingvo, pro la principo, ke ĝi servu al la tutmondaj proletoj kaj al la liberigaj movadoj en la landoj de koloniaj kaj duonkoloniaj popoloj;
- d) integra funkcio de la teorio kaj praktiko en ĉiuj laboroj;

e) zorgado pri efikaj metodoj de lingvo-instruado;

f) kamarada helpo al la komencantaj kaj nespertaj kamaradoj, en ilia esperkora, traduka aŭ verka laboro per starigo de specialaj kontrol-recenzaj kaj konsultaj fakoj;

Ĉiu landa lingvo-komisiono rajtas doni sian opinion pri la bonec-gradigo de la lingvo en la koncerna recenzata verko, esperantigita el la nacia lingvo de la komisiono. En esceptaj okazoj de bezono ISLK lasas al si rajton esti supera aproba aŭ malaproba juĝanto en taksado de la lingvo-valoroj.

ISLK solvas la kurantajn taskojn per kunsidoj en la centro, kun kondukado de necesaj protokoloj. Specialaj demandoj, traktendaj internacie, estas solvataj per enketaj kaj eventualaj korespond-diskutaj rilatoj kun la landaj lingvo-komisionoj.

La decidoj kaj rekomendoj de ISLK estas komunikataj al la landaj lingvo-komisionoj kaj devas ricevi de ili konfirman aprobon.



ISLK rajtas publikigi sub sia marko speciale kaj principe gravajn verkojn pri problemoj de la lingvo internacia ĝenerale kaj esperanto speciale.

ISLK ligas rilatojn kun ĉiuj lingvo-institucioj, bezonaj por sia celo.

ISLK laŭnecese starigas fakojn por sia interna laboro. Principe kaj ĉefe la tuta lingvo-laboro estas efektivigata de la landaj lingvo-komisionoj. En okazo de bezono ISLK povas distribui tre gravan aŭ ŝrĝan laboron inter la landaj lingvo-komisionoj, kun starigo de specialaj brigadoj.

Por la laboroj administraj reprezentaj kaj sekretariaj la ISLK elektas ĝeneralan sekretarion.

## ENHAVO

Rezolucio. Al la nova etapo . . . . .	3
A. Andrejev. Esperanto kaj dialektiko . . . . .	11
L. Ĵirkov. Esperanto kaj la lingvoj de mondo . . . . .	23
E. Drezen. Pri la libero de neologismoj en esperanto . . . . .	35
E. Drezen. La nuna esperanto, la estonta lingvo internacia kaj la lingvo tutmonda . . . . .	40
N. Hohlov. Pri unu aktuala temo . . . . .	47
Statutaro. Provizora statutaro de la Internacia Sekretariaro de la landaj proletaj esperantaj lingvaj komisionoj . . . . .	53

# LITERATURO PRI LA MONDOLINGVO

---

## *E. DREZEN*

Pr. en mkg.

Historio de la mondolingvo . . . . . 7,00

Skizoj pri teorio de esperanto . . . . . 1,10

Analiza historio de la esperanta movado . . . . . 1,70

## *L. ĴIRKOV*

Kial venkis esperanto . . . . . 0,35

## *A. ANDREJEV*

Revolucio en la lingvoscienco (eld. de SAT) . . . . . 0,70

## *E. DREZEN*

La vojoj de formiĝo kaj disvastigo de la lingvo internacia (eld. de SAT) . . . . . 0,70

**Mendu ĉe EKRELO**

**Germanio, Leipzig, Löbauerstr., 35.**



---

**„EKRELO“**

Löbauerstr. 35

LEIPZIG N 24

Germanio